


Vivis・Vojaĝis・Verkis

— 生きた・旅した・書いた

Esearo omaĝe al Vasilij Eroŝenko, 1890-1952

エロシェンコ生誕125周年記念文集



La Komitato por Celebri la 125-jaran Jubileon de Eroŝenko

エロシェンコ生誕125周年記念事業実行委員会

Enhavo / 目次

Antaŭparolo / 前書き	2
-------------------------	---

(parto en Esperanto / エスペラント部門)

◆ Studoj en Esperanto

Pri la ekspozicio de la Eroŝenko-Domo-Muzeo en Obuhovka	
--- Novikova Tatiana (tradukita esperanten)	3
Vasilij Eroŝenko kaj Esperanto --- Anatolij Masenko	16
Edukista Dimensio de Eroŝenko --- TANABE Kunio	24

◆ Eseoj en Esperanto

Esperanto kiel "Universitato" por Eroŝenko --- SASAKI Teruhiro	28
La akrvida blindula poeto --- SHI Chengtai	33
Rakontoj de Velkinta Folio --- AOYAMA Tooru	36
"Nom' de l'fajr' – estas am' al liber'": por 125-jariĝo de la	
naskiĝo de Vasilij Eroŝenko --- Julia Patlan' (tradukita esperanten)	39

◆ Verko de Eroŝenko

Paskotago	44
-----------------	----

◆ Informoj pri Eroŝenko

Kronologiaj notoj pri Eroŝenko	47
--------------------------------------	----

(parto ekspozicia / 展示部門)

Poemo "Homarano" --- ties komenco en 46 lingvoj	
エスペラント原作詩「わたしは心に」冒頭の46言語訳	49

(parto en la japana / 日本語部門)

◆ 日本語論文

鳥居篤治郎・伊都夫妻が託した『点字日記』	
ーエロシエンコに関するもう一つの記録ー --- 岸 博実	53
エロシエンコと東京盲学校 --- 井崎倫子	63

◆ 日本語エッセー

エロシエンコと二人の日本の友人 --- 引田秋生	77
拝啓エロシエンコ様 --- 林 幸子	81
父高杉一郎のこと --- 田中泰子	86

◆ エロシエンコ作品

復活祭の日	91
-------------	----

◆ 日本語資料

エロシエンコ年譜	94
エロシエンコ作品一覧 / Verklisto de Eroŝenko (kun Esperanta klarigo)	96

後書き / Postparolo	99
------------------------	----

ANTAŬPAROLO

SIBAYAMA Zyun'iti, la redaktoro de la Esearo
septembro, 2015

La nomo de Vasilij EROŜENKO, naskita antaŭ 125 jaroj, estas hodiaŭ ne multe konata eĉ inter esperantistoj, blinduloj aŭ fabelistoj, al kiuj apartenis tiu ĉi persono. Tion bedaŭrante, grupo da esperantistoj kaj blindul-edukistoj fondis la Komitaton por Celebri la 125-jaran Jubileon de Eroŝenko, kaj planis diversajn aferojn por reaprezi tiun ĉi karan kaj unikan personon. La plano inkluzivas jenajn agadojn.

1. kunsidoj memore al li en Esperantaj kongresoj aŭ kunvenoj
2. produktado kaj vendado de insigno, kun desegnita vizaĝo de Eroŝenko
3. tradukado esperanten de liaj fabeloj el la japana, ankoraŭ ne esperantigitaj. Ni intencas publikigi ilin eventuale en retejo en baldaŭa estonteco.
4. kompilo de studoj kaj eseoj pri li
5. prelego de prof. HUZII Syozo (FUJII Shozo) pri "Eroŝenko kaj Lusin" okaze de la 102-a Japana Esperanto-Kongreso en Sendai, oktobre 2015.
6. ekspozicio en "*Sight World*" (Vido-mondo), por ne-vidantoj kaj ties subtenantoj, novembro 2015, en Tokio,
7. festeno memore al li en la Restoracio de Nakamura-ya, decembre 2015. En tiu restoracio Eroŝenko loĝis en la dua restado en Japanio.

Kaj la libro kiun vi enmanigas estas la frukto de la 3-a punkto. Por tio ni alvokis al la internacia esperantista kaj blindul-edukista mondo, kaj ni elektis 12 verkojn, el 20 verkoj alvenintaj.

Ni ĉefe elektis verkojn unuafoje aperontaj en tiu ĉi broŝuro. Fakte enestas verkoj jam aperintaj aliloke, sed ili en Esperantlingva ne-brajla formo aperas premiere ĉi tie. Mi dankas al ĉiuj kontribuintoj, eĉ se ties verko ne povis aperi ĉi tie.

Al tio ni aldonis verkon de Eroŝenko mem en 1916, preskaŭ virga verko, apenaŭ konata. Kaj aperas kelkaj informoj pri li. Cetere, la titolo de tiu ĉi libro estis prenita de la skribo de la surmonumenta tabuleto por li, originale en la rusa lingvo.

Cetere, ni povis aldoni nekonatajn fotojn; pri la gepatroj de Vasilij Eroŝenko kaj li inter blindulaj ŝakistoj en 1938. Pro tio ni dankas Julia Patlan'. Ni aldonis informojn biografiajn kaj bibliografiajn, kaj lastamamente ekspozician paĝon.

Por nia agado ni ricevis de Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG), stipendion okaze de la 63-a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo junio 2015.

La eldonadon de tiu ĉi broŝuro kaj ties distribuadon al esperantistoj kaj blindulleernejoj financis la Bonfara Fonduso Taĉikaŭa de la LIONS-klubo de Nihonbasi, Tokio.

Ni dankas ilin por la subteno, kaj ankaŭ al multaj, kiuj aliĝis kaj kontribuis aŭ finance aŭ labore al la Komitato.

Pri la ekspozicio de la Eroŝenko-Domo-Muzeo en Obuĥovka

S-ino Novikova Tatiana,
estrino de la Domo-Muzeo de Vasilij Eroŝenko (u. Starij Oskol, Rusio)

Enkonduko

La artikolo estas adaptita kaj tradukita en Esperanto teksto de ordinara ekskurso de nuna estrino de la Eroŝenko-Domo-Muzeo en lia naskiĝloko, Belgoroda regiono, Rusio.

La Eroŝenko-Domo-Muzeo estis malfermita en 1990 okaze de la 100-jariĝo de la verkisto. En Rusio la Muzeo estas sola kaj unika ŝtata muzeo, kiu rilatas al Esperanto kaj fama esperantisto Vasilij Eroŝenko, kaj jam funkcias dum 25 jaroj. En la muzeo estas kvar ĉambroj – la ekspoziciaj haloj. Oni rekonstruis internan aspekton de la mezriĉa vilaĝano laŭ fino de la 19-a kaj komenco de la 20-a jarcento, kelkaj el mebloj apartenis al Eroŝenko-familio. Inter la eksponaĵoj, rakontantaj pri la agado de la verkisto, estas fotoj de Eroŝenko en eksterlandoj, objektoj por instruadi al blinduloj. En la ekspozicio oni povas vidi kelkajn el liaj libroj diverslingve.

En tiu ĉi artikolo, laŭirante la muzeajn ĉambrojn, la aŭtoro priskribas la vivon de Eroŝenko de la naskiĝo ĝis la morto.




foto: la domo-muzeo エロシェンコ記念博物館 (1990 年開館)

1. Pri la Domo-Muzeo

La Eroŝenko-Domo-Muzeo estis malfermita en 1990 okaze de la 100-jariĝo de la verkisto Eroŝenko. La Domo-Muzeo enhavas terspacon je 2,4 hektaroj, en ĝia centro estas rekonstruita la domo de Eroŝenko-familio. Tiam helpis dum la rekonstruo de la

estonta muzeo la kuzinoj de Vasilij Eroŝenko: Nina Eroŝenko, Natalia Sidorenko kaj Lidia Baulina.

Okaze de la 120-jariĝo de naskiĝo de la verkisto la 12-an de januaro 2010 antaŭ la Domo-Muzeo estis starigita monumento. Ĝi estas frukto de la Staro-Oskola skulptisto Vasilij Kolesnikov.

Vasilij Eroŝenko (12.jan.1890 – 23.dec.1952) – la verkisto, vojaĝinto, pedagogo, esperantisto, muzikisto travivis vivon interesan, plenan da danĝeroj kaj aventuroj. Surmonumenta tabuleto enhavas ruse vortojn de Eroŝenko: “Vivis, vojaĝis, verkis...” La vivo de Eroŝenko estas la plej eminenta etalono ne nur por la blindularo.

En la muzeo estas kvar ĉambroj – la ekspoziciaj haloj kun ĝenerala areo de 64 kvadrataj metroj. Oni rekonstruis internan aspekton de la mezriĉa vilaĝano laŭ fino de la 19-a kaj komenco de la 20-a jarcento: objektoj de la meblaro, ĉiutaga vivo, kelkaj el ili apartenis al Eroŝenko-familio. Inter la eksponaĵoj, rakontantaj la agadon de la verkisto, estas fotoj de Eroŝenko en eksterlandoj, objektoj por instruadi al blinduloj. En ekspozicio ĉi tie oni povas vidi kelkajn el liaj libroj diverslingvaj.

En komenco de la ekspozicio situas busto de Vasilij Eroŝenko kiel faritaĵo de ukraina skulptisto-esperantisto Nikolao Blaĵkov. Apudas portreto de Eroŝenko farita de amatora pentristo, korespondanto de regiona radio M. Kuprejev. Oni spektas Eroŝenkon en frambkolora rusa tradicia ĉemizo, kun ĉetalia ŝtofa zono je fono de la vilaĝa vasteco.

2. Halo N1. “Infaneco de Vasilij Eroŝenko”

La gepatroj de Vasilij naskiĝis samjare en 1866. Ili naskiĝis en diversaj lokoj. La patro, Jakov Eroŝenko, originis el vilaĝo Ĉernjanka de Novo-Oskola *uezd* (t.e. distrikto) de Kurska gubernio. La patrino, Evdokia Semikina, naskiĝis en urbo Starij Oskol de la sama gubernio. Post la geedziĝo la paro elektis lokon por la vivo en vilaĝo Obuĥovka, je 20 km for de la uezda urbo Starij Oskol.

La 12-an de januaro 1890 ĉe gevilaĝanoj Jakov kaj Evdokia Eroŝenko naskiĝis jam kiel la tria ido. La familio estis multnombra: travivis kaj maturiĝis tri filoj – Aleksandro, Vasilij, Ivan, ankaŭ kvar filinoj – Neonila, Pelagia, Maria, Nina.

La patro havis butikon en la domo. Li komercadis, interalie per la arbaro. Jakov unue aĉetis arbarpecon de grafo Orlov-Davidov, al kiu apartenis la apudaj ter- kaj arbarpecoj, poste li dungis hakistojn por prilabori la trunkojn por vendi. El la eventoj estas memorfiksita incendio en 1920, forbruliginta la domon. Dum la incendio Jakov savante la havaĵon brulvundis brakojn kaj kolon kaj aspektis tuj mortonta. Sed dank'al la tradicia medicino travivis post 40-taga kuracado en teretaĝo. Poste la domon oni rekonstruis, sed nun sen la butiko. La Muzeo estas ĝusta kopio de la dua domo.

La patrino mastrumadis en la domo. En la hejmo ĉiam estis bakitaĵoj per kiuj oni regalis najbarajn infanojn. La tuta familio estis amikema kaj laborema. La trajtojn Vasilij Eroŝenko demonstris dum tuta sia vivo. Lia ĉefa devizo estis: “Necesas

konstante memklerigadi, laboradi, nur tiam vi estos feliĉa mem, ankaŭ la lando". La gepatroj monon ne akumulis kaj intencis doni al la infanoj kleron.

Oni rememoris, ke dum aŭtunaj kaj vintraj vesperoj, kiam la vilaĝanoj venis el la preĝejo en mallumo, en la najbara domo de Eroŝenko oni starigis ĉe la fenestroj kerosenaj lampoj, por la komforto de la homoj ekstere.

Estante kvarjara Vasilij malsanis je morbito. La malsano progresis komplike. La onklino de Vasilij portis lin al preĝejo, kiu situas kontraŭ la domo. Dum la vizito de la preĝejo Vasilij malvarmumis kaj pro tio blindiĝis pro malfacilaĵo de la malsano.

Post multe da jaroj Eroŝenko rakontis al siaj japanaj amikoj, ke blindiĝinte li iĝis malfacila infano: dum tutaj tagoj li sidis en malluma angulo, kvazaŭ kaptita lupido, atakis kontraŭ ajna vorto kaj ploradis. La patrino prenis lin je la brako kaj akompanis straten. Vasilij puŝiĝis kontraŭ io, falis kaj refoje kaŝis sin en la angulo. Nun, legante rakonton de Eroŝenko verkitan post multaj jaroj pri la blinda knabo, oni povas imagi kiel tio okazis. En la hejmo li puŝiĝis kontraŭ sojla ŝtupo, fajrostango, skabeloj. Irante al kuirejo por varmiĝi li brulvundis manojn, la tekruĉo ŝprucis lin per brulakvo, ankaŭ forko pikis fingrojn. En la apuddoma korto lin atendis danĝeroj – la ŝtonoj kaj kavoj. Unue Vasilij ĉion timis, sed venkis sin mem kaj faris sian unuan paŝon el la mallumo.

En sia verko li poste prezentis: *"Mi estas blinda, mi blindiĝis kiam mi estis kvar-aĝa. Kun larvoj kaj plendoj mi forlasis la regnon de l' belaj koloroj de l' brila sunlumo. Ĉu tio ĉi estis por bono aŭ malbono, mi ankoraŭ ne scias. La nokto daŭras longe kaj daŭros dum mi spiras. Sed, ĉu mi malbenas ĝin? Ne, certe ne. La fama blinda aŭtoro S-ro Hawkes en sia "The Hitting of the Dark Trail" diras: "La suno en tagmezo montris al mi la mondon kaj ĉiujn ĝiajn mirindaĵojn, sed la nokto montris al mi la universon, la sennombrajn stelojn kaj senliman spacon, la vastecon kaj mirindecon de la tuta vivo; la perfekta tago montris al mi nur la homan mondon, sed la nokto montris al mi la Dian universon. Kvankam la nokto alportis al mi doloron, tre ofte malkuraĝigon, tamen en ĝi mi aŭdis la stelojn kantantajn kune, kaj lernis scii la naturon kaj tra la naturo vidi la Dion de la naturo"* ("Unu paĝeto en mia lerneja vivo").

Kaj efektive Eroŝenko ellernis ĉion: kun aliaj infanoj li vizitis arbaron, eĉ unu fojn ne perdiĝinte, plej bone ol ĉiuj li naĝis en rivero kaj kaptis kankrojn.

La Eroŝenko-familio amikis kun familio de Soldatov. Rememoras Taisia Naŭmenko, filino de vilaĝa meblisto Petro Soldatov: "Nia familio estis malriĉa. Jakov Eroŝenko ofte helpis nin. Malavare pagis al la patro pro la manfaritaj meblaĵoj".

En la ekspozicio estas meblaro farita per la manoj de Petro Soldatov: la librobretoj, kuirĉambra bretaro kaj meblaro, produktitaj en la 20-aj jaroj de la 20-a jarcento. Estas deponata originala manĝotablo, kies tabloplato post faldoj triobliĝas, farita speciale por la tuta granda Eroŝenko-familio.

En la gasteĉambro, kiel oni nomis la unuan ĉambron en la Eroŝenko-domo,

situas ligna kanapo kun eltranĉita dorsapogilo, kuirĉambra bretaro por festa vazaro, seĝoj, spegulo. La granda spegulo ornamita per bela eltranĉita kadro informas pri tio, ke Eroŝenko-familio efektive estis riĉa.

Bedaŭrinde, la najbara Petra-Paŭla preĝejo forbrulis en 1946. Ĝi estos rekonstruota, sed nun sur la loko estas memorŝtono. En la ekspozicio videblas la maketo kaj foto de la preĝejo, ankaŭ ikonoj, donacitaj por la muzeo de la vilaĝanoj. Iu ikono estas originala pro la palpebleco de Tiĥvina Dipatrino. Por la Eroŝenko-Muzeo la ikonon donacis Staro-Oskola Blindul-Asocio.

Iniciatinto de la blindulejo estis Vasilij Eroŝenko mem. La Staro-Oskola filio de Tutrusia Blindul-Asocio estis fondita en 1951. La unua persona listo enhavis 17 homojn. Por hodiaŭ (2015) la societo enhavas 416 personojn.

La popola saĝo instruas: “Ne tiu blindas, kiu ne vidas, sed tiu, kies cerbo ŝlimas”. En apuda urbo estas Staro-Oskola filio de regiona speciala por blindularo Eroŝenko-biblioteko: brajla literaturo, sonlibraro. Oni povas elekti librojn por ajna gusto. Moskva sonregistrejo “LOGOS” ekde 2010 produktas librojn memorkarte. Dank’al tio vizitanto en la biblioteko povas enŝuti al sia memorkarto ajnan libron.

Membroj de la Staro-Oskola Blindul-Asocio estas oftaj gastoj de Eroŝenko-muzeo, renkontoj, vesperoj dediĉitaj al tagoj de la Blanka Promenbastono, al Internacia Tago de invalidoj, al memoro de Eroŝenko-tagoj.

3. Halo N2. Moskva lernejo por blinduloj kaj eksterlandaj vojaĝoj.

Vasilij Eroŝenko preskaŭ ĉiam vojaĝis sen konstanta akompananto. Li piedpaŝis multajn kilometrojn kaj emis ripeti, ke la vojaĝado estas vivo. Dum sia vivo Eroŝenko ekposedis kelkajn lingvojn; Eroŝenko instruis lingvojn rusan, anglan, turkmenan, Esperantan k.c. Li ludis violonon, gitaron, balalajkon. Li laboris kiel masaĝisto, dum multaj jaroj direktoris en blindulara lernejo por infanoj. En la ekspozicio estas palpebla monda mapo produktita speciale por blinduloj.

En la Statuto de Moskva societo de la prizorgo, eduko kaj klero por blindaj infanoj fine de 19-a jarcento estas vortoj: *“La ĉefa celo de la klerig-edukejo por blindaj infanoj estas pretigi la blindulojn al memstara vivo kiel utilajn por si mem ankaŭ por ceteruloj laborantojn, sufiĉe maturajn je fizika, morala kaj intelekta statoj”*.

Fratino de Vasilij, Maria, rememoris ke la grafo Orlov-Davidov, vidinte blindan knabon, helpis al la patro loki Vasilij-on al la Moskva klerig-edukejo. En julio de 1899 la patrino veturigis blindan filon al Moskvo de la loka fervojstacio Golofejevka per trajno. Vasilij tiam estis 9-jara.

En la lernejo oni instruis al blindaj infanoj legi kaj skribi brajle, aritmetikon, geografion, historion, natursciencojn kaj Leĝon Dian. Ekde la unua tago la infanoj parkeris versojn. Edukatoj surfadenigis vitrajn bidojn, plektis kolorajn paperojn kaj plenumis ekzercojn por fingraj sensoj. En pliaĝa grupo de la lernejo al infanoj instruis metiojn: plekti korbojn, pajlajn skriptapiŝetojn, tapiŝojn, sidplatojn por seĝoj. En la lernejo estis kant- kaj muzik-lecionoj. Vasilij ekposedis ludi violonon,

gitaron, kantis en la lerneja koruso.

Post multaj jaroj Eroŝenko verkis tekston “Unu paĝeto en mia lerneja vivo”. La literatura verko estas simbola, sed ne ĝusta memoraĵo. Finlerninto de la lernejo Mikaelo Kislov rememoras: *“En la lernejo oni batis neniun. Sed punoj estis seriozaj kaj humiligaj. Ekzemple, stari tra la tuta nokto kiel fosto en kancelario, oni senigis tagmanĝaĵon, aparte dimanĉan kukon. La infanoj amis vespere aŭskulti belliteraturaĵojn legataj de la edukistoj. Eroŝenko lernis ĉion sukcese: li havis perfektan memorkapablon”*. Kislov daŭrigas: *«Li famiĝis en la lernejo kiel “verkisto”... Eĉ ni, la lernantoj, kiuj venis post lia foriro, aŭdis de pliaĝuloj pri lia talento elpensi longajn fabelojn...»*.

La lernejon Vasilij finis en 1908. La kuratoroj helpis al sia finlerninto trovi laboron kaj loĝejon. Eroŝenko spertis konkurson por labori en blindulara orkestro kiel la dua violonisto.

El la libro de Viktor Perŝin, lerninto de Eroŝenko en la Moskva lernejo dum 1946-1948: *“La 15-an de majo 1908 post elirekzameno Vasilij Eroŝenko forlasis la lernejon kaj komencis memstaran vivon. La Moskva klerig-edukejo donis al li metiojn de broŝisto kaj korboplektisto, ankaŭ profesian bazon de muzikisto-violonisto kaj eternan malamon al ĉio ŝtata. Kiel finlerninto oni trovis por li ĉipan ĉambreton kaj lokon de dua violonisto en la moskva blindula orkestro”*.

En 1911 Vasilij kun la kolektivo turneas tra Kaŭkazio. Post la turneo Eroŝenko veturis por ferii al Obuĥovka. Li alportis du kandelingojn el maraj konkaĵoj, ankaŭ bonodorajn pirojn donace al siaj parencoj. Post la feritagoj Vasilij revenis Moskvon.

Iam Eroŝenko konatiĝis kun Anna Ŝarapova, la instruistino de angla lingvo. Tiutempe en Moskvo ŝi instruis Esperanton. Ŝarapova tradukis al Esperanto verkojn de Lev Tolstoj, M. Lermontov k.c. Ŝarapova estis sekretario en Internacia Unio de Esperantistoj-vegetaranoj. Lev Tolstoj estis la unua honora prezidanto de la Unio.

Anna Ŝarapova konsilis al Eroŝenko unue ellerni Esperanton kaj post tio daŭrigi studon en Anglio. En Norvudo (*Norwood*), apud Londono, funkciis Reĝa Kolegio por blindularo (*Royal Normal College for the Blind*), en kiu oni povus ricevi muzikan kleron. Eroŝenko vizitas E-kurson kaj lernas la anglan laŭ angla-rusa vortaro. Ŝarapova helpas al Eroŝenko por vojaĝo. Por tio ŝi verkis petskribojn al esperantistoj en Varsovio, Berlino, Kolonjo, Kalezo pri helpo dum la vojaĝo al rusa blinda esperantisto.

En februaro de 1912 la junulo veturis renkonte al granda mondo. Eroŝenko estis helpenda, kaj pro tio esperantistoj patronis dum lia vojaĝo laŭ la itinero. Por rekono sur la vesto de Eroŝenko estis verda kvinpinta steleto – la simbolo de esperantistoj. Kiam estis bezono ŝanĝi trajnon, li elvagoniĝinte staris sur perono, al li venis nekontaj amikemaj personoj. La renkonto kun ili estis anticipe preparita. Ili konversaciis kaj akompanis lin.

En Londono Eroŝenkon renkontis geedzoj Blaise, kiuj prezentis al li loĝejon en sia vegetaranejo, ankaŭ instruiston de angla lingvo, posedantan brajlan skribon – s-ron Phillimore. Baldaŭ Eroŝenko estis prezentita al gelordoj Campbell, kiuj estris

la Reĝan Kolegion en Norvudo. Eroŝenko estis akceptita al la Kolegio por du monatoj. En Anglio Eroŝenko vizitis fondinton kaj teoriulon de rusa anarĥismo Petro Kropotkin. Post ok monatoj Eroŝenko revenis Moskvon kaj rekomencis labori en la orkestro. Informo pri la vojaĝo de la rusa blindulo aperis en gazetoj rusaj “Blindulo”, “Ĉirkaŭ la Mondo”, “La Ondo de Esperanto” k.c.

William Merrick rakontis al Eroŝenko pri tio, ke en Japanio ĝis nun funkcias antikva instrusistemo kaj helpo al blindularo. Eroŝenko komencis studi la japanan jam en Moskvo ĉe iu japano. La vojaĝo al Japanio realiĝis nur en 1914. La 27-an de aprilo Eroŝenko venas Tokion. Por la vojaĝo la moskvaj esperantistoj donis al Eroŝenko monon kaj rekomendan leteron por estro de la Centra Meteologia Observatorio en Tokio, vic-prezidanto de Japana Esperantista Asocio s-ro Nakamura Kijoo. La unuan periodon Eroŝenko loĝas ĉe la estro, studas la japanan lingvon kaj kutimaron de japanoj. Laŭ la rekomendo de Nakamura Kijoo Eroŝenkon akceptas en lernejon, en kia oni instruas la blindulojn al masaĝarto. Eroŝenko loĝas ĉe la lernejo. Post reveno el vojaĝoj al Birmo kaj Hindio en 1919 Eroŝenko loĝas ĉe kafejo “Nakamuraja”. La kafejmastrino Soma Kokko lernis la rusan kaj helpis al Eroŝenko ekposedi la japanan lingvon.

Konserviĝis rememoroj de japanaj amikoj de Eroŝenko, ke la verkisto kaptis atenton per sia alta staturo, per helaj densaj bukloj ĝis la ŝultroj, poste lia blindeco, kiaj elvokis intereson al la ruso en Japanio. Ne estas mirinde, ke en la 1920 du konataj japanaj pentristoj – Nakamura Tsune (1887-1924) kaj Tsuruta Gorō (1890-1969) samtempe faris portretojn de Eroŝenko laŭ eŭropa maniero de la pentroarto – olepentraĵoj sur ŝtofo.

La laboro estis farita en laborĉambro de Nakamura. La nuntempa japana esploristino pri la vivo de la pentristo eĉ rearanĝis laŭ la malnovaj fotoj kaj portretoj de Eroŝenko la meblan situon en la laborĉambro kaj lokojn de kiuj la majstro faris la konatajn portretojn. Ekzemple la frukto de la pentristo “Portreto de sinjoro Eroŝenko”^(*) gajnis mencion en la Dua Imperiestra ekspozicio de la artoj: *“la plej bona olepentraĵo, farita far’de japano, de tiam, kiam la okcidenta skolo de la pentroarto disvastiĝis en Japanio”*. Nuntempe la portreto estas ekspoziciata en ekspozicio de la Ŝtata Muzeo de Moderna Arto en Tokio kaj estas kiel ĝia vizitkarto.

La portreto “Blindulo Eroŝenko” farita de Tsuruta situas en la kafejo “Nakamuraja”, ankaŭ sur honora loko kaj atestas pri historio de la firmao, kia celebris en 2009 sian centjariĝon.

Baldaŭ la rusa esperantisto konatiĝis kun dramisto Akita Tokuzo (pseŭdonome Akita-Ujaku), ĝejurnalistoj Kamitika Itiko kaj Fukuoka Sejiti, kun la estonta fama rusologo Katagami Noboru. Eroŝenko havis intereson pri originala kulturo de Japanio riĉa je antikvaj tradicioj, pri japana literaturo. En komenco de 1916 en japanaj gazetoj aperis liaj verkoj, kiujn li diktis al siaj amikoj, kiuj tradukis ilin. Temas pri “Rakonto de papera lanterno” kaj filozofia parabolo “Pluvas”.

Por junularo de Tokia blindulara lernejo Eroŝenko iniciatis E-kurson per kio li ricevas vivpanon. Printempe 1916 Eroŝenko vizitis insulon Hokajdo, prelegis en

renkonto de esperantistoj en urbo Jokohama.

Julie 1916 Eroŝenko perŝipe venas Bangkokon, la ĉefurbon de Tajlando. El leteroj al japanaj amikoj estas sciataj kelkaj detaloj de lia restado en la lando. En letero al Torii Tokujiro (1894-1970) Eroŝenko skribas, veninte Bangkokon li komencis klopodi pri fondo de la lernejo por blindularo. Ĝuste kun la celo li venis ĉi landon. Sed por fondi la lernejon estas bezonataj financoj, sed ili mankas. Atinginte nenion Eroŝenko veturas al Birmo, tiutempe la britlanda kolonio.

En mezo de januaro 1917 Eroŝenko venas al Moulmejno, la duan urbon en Birmo post Ranguno. Jen estas vortoj de Eroŝenko pri Birmo en ruslingva skizo “Blinduloj de Okcidento kaj Oriento”: *“En la lando de rubenoj kaj safiroj, de kokospalmoj kaj tamarindoj, papajoj kaj bananoj, mangoj kaj ananasoj dum la tuta jaro floras odoraj floroj kaj tintas milionoj da arĝentaj sonoriletoj de sennombraj pagodoj, dismetitaj tra la tuta lando”*. En Moulmejno al Eroŝenko oni proponis estri la lernejon por blindaj infanoj. Eroŝenko esploras folkloron kaj popolan fabelaron de Birmo. Poste aperos lia verko “Birma legendo”, unue aperinta en japana gazeto en 1920.

En 1917 Eroŝenkon atingas informo pri revolucio okazinta en Rusio. Li estas maltrankvila pri siaj parencoj kaj decidis reveni al patrolando. La plej proksima vojo al Rusio estis tra Hindio. La 17-an de novembro 1917 li venas Kalkuton. En marto de 1918 li revenas al Moulmejno. Laborinte kiel instruisto ne pli ol dum ses monatoj Eroŝenko revenas Kalkuton kun intenco forveturi al Japanio. Fuginte el hotelo kaj eskapinte hejman kontrolon Eroŝenko vagadas tra Hindio. Li esploras riĉan kulturon de la lando. Liaj konoj poste iĝos kiel fundamento por temoj de liaj fabeloj: “Rakontoj de Bajtalo”, “Kruĉo da saĝeco”. Sed en Madraso, en urba lernejo por blinduloj, la kolonia polico arestis lin kaj rekondukis al Kalkuto.

Somere de 1919 Eroŝenko estis deportita el Hindio Japanion. Certe liaj japanaj amikoj estis kontentaj pro lia reveno. En Japanio tiutempe evoluas tiel nomata proleta literaturo. Eroŝenko aktive partoprenas en kolektiva vivo, en laboroj de literatura societo “Semanto”, vizitas kunvenojn de Socialista Ligo. Tiutempe Eroŝenko verkis kelkajn fabelojn.

En 1920 Eroŝenko partoprenas en la Unua-majfestoj, la 9-an de majo vizitas kunvenon de Socialista Ligo de Japanio. La 28-an de majo nokte Eroŝenko estis arestita. Japana registaro decidis deporti Eroŝenkon el la lando.

“La deporto, – poste informis Eguchi Kiyoshi, – estis plenumita per maldelikata perforto. Tri tagojn Eroŝenko estis en policeja malliberejo de Yodobasi”. Soma Kokko notis fabelon diktitan al ŝi en malliberejo: “Malvasta kaĝo”, kia estis verkita antaŭ unu tago ĝis la aresto.

4. Halo N3. «Vasilij Eroŝenko – verkisto, instruisto, esperantisto»

La 1-an de junio 1921 polico kondukis Eroŝenkon al haveno Curuga, tie la 4-an de junio kun akompano de policano li estis alŝipigita al ŝipo “Hozan-maru”. Post du diurnoj Eroŝenko venis Vladivostokon. En la urbo li verkis notojn pri deporto el

Japanio. Eble, Eroŝenko intencis reveni al naskiĝvilaĝo Oĉuĥovka. Sed en Rusio estis intercivitana milito kaj limgardistoj de urbo Imano ne permesis al Eroŝenko reveni kaj li direktis sin al Ĉinio.

En Ĥarbino Eroŝenko dum tri monatoj perlaboris vivpanon kiel masaĝisto. De japanaj amikoj venis informoj, ke estas eldonitaj liaj verkoj, sendas al li monon. Sub redakto de Akita Uĵaku aperis kolekto de Eroŝenko-verkoj “Kantoj antaŭ tagiĝo”, en la gazetoj “*Warera*” kaj “*Kaizo*” estis publikitaj fabeloj “Lando de Ĉielarko” kaj “Malvasta Kaĝo”.

Hujucz, la juna ĉina literaturisto-esperantisto en Ŝanhajo, invitis Eroŝenkon al si. La 1-an de oktobro Eroŝenko forlasis Ĥarbinon kaj post unu semajno venis Ŝanhajon. En Pekino gazeto “Nova junularo” (“*Xīn Qīngnián*”) aperigis fabelojn “Malvasta kaĝo” kaj “Apud marĉo” en traduko de Lusin.

La ĉefa verko verkita de Eroŝenko en Ŝanhajo estas kolekto de versoj en prozo “Rakontoj de velkinta folio”. En januaro 1922 en ŝanhaja gazeto “Monatlibro de prozo” (“*Xiaoshuo Yuebao*”) tradukita de Lusin en ĉina lingvo aperis verko de Eroŝenko “Tutmonda incendio”. En E-gazeto “Verda Lumo” samjare aperis en E-o “La pafilegoj tondras en la malproksimo”.

La granda ĉina verkisto Lusin ĉinigis rusajn klasikulojn inkluzive Eroŝenkon, sed renkontiĝis kun li nur en la jaro 1922. Dum mallonga periodo ekde la 24 de februaro 1922 ĝis la 15 de aprilo 1923 du personoj, enhavantaj literaturajn talentojn, donacis al la legantaro kelkajn belajn verkojn. Eĉ pli, ilia reciproka influo estis tiom granda, ke dum multaj jaroj el-sub iliaj plumoj aperis rakontoj, noveloj, fabeloj markitaj per “stampo” de reciproka amikeco.

Kvin noveloj el kolekto de Lusin enhavas datojn de junio ĝis oktobro 1922. Dum la periodo Eroŝenko vivis ĉe Lusin, konstante konversaciis, pretigis siajn verkojn por eldono en la ĉina lingvo. Nuntempe laŭ lerneja programo de Ĉinio oni studas verkojn de Lusin, inkluzive “Komedion de la anasoj” pri la rusa blinda verkisto kaj vojaĝinto Eroŝenko.

En Pekina Universitato estis fondita kurso por studi Esperanton. Lusin kun lia frato Zhou Zuoren, kiu estris la lokan Esperanto-Asocion, proponis al Eroŝenko instrui Esperanton tie. En julio de 1922 Eroŝenko estis delegita de la Pekina Esperanto-Ligo al la 14-a Universala Kongreso okazanta en Finnlando. Post la Kongreso Eroŝenko vizitinte naskiĝvilaĝon Oĉuĥovka revenas al Pekino.

Eroŝenko prelegas pri la rusa literaturo en Pekina Universitato kaj Virina pedagogia kolegio, aperigas vicon da artikoloj, vizitas teatron. Lusin tradukas teatraĵon de Eroŝenko “Persikkolora nubo” en la ĉinan. En Ŝanhajo aperis kolekto de Eroŝenko-verkoj Esperantaj “Ĝemo de unu soleca animo”.

En aprilo de 1923 Eroŝenko forlasas Pekinon. Somere de 1923 li veturas al la 15-a Universala Kongreso okazanta en Nurnbergo, Germanio. Samloke okazis internacia kongreso de esperantistoj-blinduloj. Hungara esperantisto Kalomano Kaloĉajo post 50 da jaroj aperigis siajn rememorojn pri parolo de Eroŝenko en la kongreso. Kaloĉajo enmanigis al Eroŝenko premion pro la plej bela E-deklamo de

lia **propra** verso “Antaŭdiro de la ciganino”. Post la kongreso Eroŝenko vojaĝis tra Eŭropo: li vizitis Leipzigon, Parizon, Vienon. Li sukcesis partopreni la vican 16-an **Universalan Kongreson** okazintan somere de 1924 en Vieno.

Definitive al Sovetio Eroŝenko venis en septembro de 1924. Vizitinte vilaĝon Obuĥovka li denove veturas al Moskvo kaj laboras tie kiel lektoro de rusa lingvo por **japana grupo** kaj samtempe kiel tradukisto, en Internacia universitato de laboruloj de Oriento ĝis februaro 1928.

Oni konjektas, ke en 1929 Eroŝenko vizitis Ĉukotkon, eble, kiel kunlaboranto (t.e. ekster la salajrata aro de oficistoj de redakcio) de la gazeto “Vivo de blinduloj”. Eroŝenko notis en la skizo “Renkontiĝoj en Ĉukotko”: “*Unu el la celoj de mia vojaĝo al Ĉukotko, estis, interalie, konatiĝo kun vivomaniero de blinduloj apud Polara cirklo*”. Reveninte, Eroŝenko verkis kelkajn verkojn pri la ĉukotka temo, kiuj pli poste A. Masenko kaj A. Pankov en 1970-aj jaroj kunigis en memeldona broŝuro sub komuna titolo “El vivo de la ĉukĉoj”. La tekstoj unue aperis en ĵurnalo “Esperanta Ligilo” ekde la jaro 1933 ĝis 1947.

Post la Ĉukotko Eroŝenko laboris en vilaĝo Ponetajevka de Gorkova (nun Nijegoroda) regiono, en profesii-teknika lernejo por blinduloj kiel instruisto de rusa lingvo kaj matematiko.

En 1932 li laboras en Moskvo kiel korektisto en tipografio brajla, kunlaboras kun Tutrusia Blindul-Asocio, tradukas por la societo korespondaĵojn el la angla al rusa lingvo, respondas esperantistajn leterojn.

Aŭtune de 1934 Eroŝenko forveturas Turkmenion. Unue li loĝas en Aŝĥabado, kaj ekde majo de 1935 en urbo Kuŝko, tie li fondas laŭ peto de ministerio de Turkmena Respubliko lernejon por blinduloj. Eroŝenko estas ĝia unua direktoro. Laŭ peto de Eroŝenko el Moskvo venas liaj malnovaj amikoj-instruistoj – la geedzoj Ŝamin por instrui muzikon al la infanoj.

Eroŝenko ellaboras propran varianton de la brajla skribo por turkmena alfabeto, laŭ brajlo li reverkas lernolibrojn de la lerneja programo. Krom la lecionoj, infanoj aranĝas teatraĵojn, koncertas por loka loĝantaro. Tiutempe estis malfacila kaj malsata periodo. Por vivteni oni prizorgis legomĝardenon kaj dombestaron. Eroŝenko estante sperta vojaĝinto instruis al infanoj orientiĝi en montoj, transiri montan riveron.

Jam en 1940 en la lernejo oni uzis lernolibrojn por 1-a kaj 2-a klasoj redaktitaj de Eroŝenko en turkmena lingvo. La lernolibroj estis presitaj en Moskvo dank'al **insisto** de Eroŝenko.

La lernantoj aprezis Eroŝenkon pro lia konduto: li ĉiam estis bonkora, estimanta; li **penis** ellabori ĉe la lernantoj memstarecon je la propraj kompreno kaj konduto. Ofte en vesperoj Eroŝenko venis al infanoj, rakontis al ili fabelojn, pri interesaj aventuroj okazintaj dum liaj vojaĝoj tra la landoj.

Printempe kaj somere infanoj kun Eroŝenko marŝis al naturo. Eroŝenko rakontis pri plantoj, instruis identigi ilin, ankaŭ orientiĝi en la vasteco. La lernejo havis tri **mastrumejojn**: trideko da ŝafoj, du azenoj, terspaco ĉirkaŭ 1 hektaro en kiu oni

kulturis hordeon kaj ceterajn legomojn. En la apudlerneja mastrumejo laboris ĉiuj lernantoj.

Dum somera ferio 1938 Eroŝenko vizitis Leningradon kiel ŝakisto en la unua Tutunia ŝakturniro de blinduloj kaj gajnis la trian lokon. Pri tio li verkis artikoleon por gazeto “Vivo de blinduloj”.

Eroŝenko forlasis Turkmenion en la jaro 1945. Por la tuta vivo li restis kiel etalono por la lernantoj: honesta, verama, neprofitema, alloga rakontanto. Kun kelkaj lernantoj Eroŝenko korespondis dum tuta vivo, interesiĝis pri la sortoj de la edukitoj.

En 1945 Eroŝenko revenis Moskvon, sed ne ricevinte loĝregistron, forveturis al urbo Zagorsko kaj tie instruis brajlan skribon, rusajn lingvon kaj literaturon en muzika lernejo por blinduloj kiuj blindiĝis dum la Dua Mondmilito. Mankis metodika literaturo por instruado kaj Eroŝenko sendas peton pri la helpo al Anglio, al sia malnova amiko-esperantisto – William Merrick, kiun li konis ekde 1912. Eroŝenko ricevis helpon kaj post kelkaj monatoj venas bezonata literaturo.

Ekde oktobro 1946 Eroŝenko laboras en la sama moskva lernejo, kiun li finis en 1908. Pri tio atestas dokumenta informo: *“Notico de la Moskva instituto por blinduloj de la 11 de marto 1949 N 120 atestas, ke k-do Eroŝenko V. Ja. efektive laboris en la Moskva instituto por blindaj infanoj kiel instruisto de angla lingvo ekde la 1 de oktobro 1946 ĝis la 16 de junio 1948 jaro”*.

En 1948 Eroŝenko veturas al Uzbekistano, kie partoprenas en laboroj de kongreso de blinduloj, okazinta en Taŝkento. Li laboris en lernejo por blindaj analfabetuloj.

En 1951 Eroŝenko veturas al Jakutio, eble por serĉi sian plijunan fraton Ivan, sed eble por trovi laboron en tiea blindullernejo. En urbo Jakutsko li vizitis societon blindulan, ankaŭ blindulejon por infanoj, kun kiuj li piediris al naturo. Baldaŭ Eroŝenko forlasis Jakution.

5. Halo N4. “Revenon al naskiĝloko”.

La novan jaron 1952 Eroŝenko renkontis en Moskvo, en loĝejo de lia amikino Zinaida Ŝamina. Poste li forveturis al Starij Oskol kaj Obuĥovka. En marto li vizitis fratinon Maria, loĝanta en urbo Ĥarkovo, iom da tempo vivis ĉe alia fratino – Neonila en urbeto Ĥolodnaja Balko, ankaŭ vizitis plijunan fratinon Nina, kiu loĝis en Karelio.

En majo Eroŝenko revenis al Obuĥovka. Laŭ vortoj de lia kuzino Vera Serdjukova, tiutempe loĝinta en domo de Eroŝenko-familio, li ĝis la lastaj tagoj ion verkis.

Forpasis Vasilij Eroŝenko la 23-an de decembro 1952 kaj estis enterigita en vilaĝa tombejo. Sed nia samlandano – verkisto, esperantisto, humanisto, vojaĝinto, kleriganto plu vivas en la memoro de la homoj ankaŭ en siaj verkoj.

Unu el la plej valoraj dokumentoj en ekspozicio de la Muzeo estas leteroj de

japana profesoro Takasugi Itiro (1908 – 2008). Takasugi Itiro, esplorante kreadon de Eroŝenko, revis pri la fondo de muzeo en naskiĝloko de la poeto, kun la peto profesoro turnis sin al la samvilaĝanoj de Eroŝenko. Fine en 1990 la profesoro sukcesis realigi sian delongan revon: viziti urbojn Belgorodo, Starij Oskol kaj vilaĝon Obuĥovka dum la malfermo de la Eroŝenko-Domo-Muzeo. Dum la vojaĝo la profesoron akompanis lerninto de Eroŝenko – Viktoro Perŝin.

La vivon kaj kreadon de Eroŝenko plu esploras ankaŭ en Ĉinio. Tradukisto de la rusa literaturo Ge Baoquan – fama literatursciencisto, en la 1960-aj jaroj verkis artikolon “Lusin kaj Eroŝenko”, en kia estis priskribita krea kaj fruktodona amikeco de la ĉina kaj rusa verkistoj. Ankaŭ Ge Baoquan en siaj leteroj menciis pri konstruota muzeo. La leteroj ankaŭ estas deponitaj en la ekspozicio “Por memori V. Ja. Eroŝenkon”.

Bedaŭrinde, nur jam post la morto de Eroŝenko, aperis intereso pri li ankaŭ en nia lando. En 1958 en gazeto “*Znamja*” (“Standardo”) aperis artikolo de Vladimir Rogov “La rusa amiko de Lusin”. La artikolo iĝis elirpunkto en esplorado de la biografio kaj kreado de nia fama samlandano.

En 1962 Belgoroda libroeldonejo eldonis libron de Eroŝenko “Koro de Aglo” kun enkonduka artikolo de moskva ĉinologo kaj poste fama verkisto Roman Belousov.

En 1977 de la sama kompilinto en la eldonejo “*Nauka*” (“Scienco”) aperis volumeto “Elektito”.

Aperis vico da verkoj esplorintaj vivon kaj kreadon de Eroŝenko: en 1978 aperis beletra-dokumenta verko de Aleksandro Ĥarkovskij “La homo, kiu ekvidis la mondon” ruslingve; N.Hordienko-Andrianova “Ekbruligis mi fajron en kor’...” (1973, 1977) ukrainlingve.

Estas ruse interesaj verkoj de B.Osikov “Muzikisto, vojaĝinto, poeto, pedagogo” (1989), ankaŭ libro de V. Lazarev kaj V. Perŝin “Impulso de Eroŝenko” (1991) eldonita okaze de la 100-jariĝo de la verkisto. En 2010 okaze de la 120-jariĝo de la verkisto aperis libreto “Homo de la Mondo”.

Ekde 2002 sukcese funkcias Internacia scienc-esplora grupo “Vasilij Eroŝenko kaj lia epoko”.

La verkoj de Eroŝenko egale estas interesaj por infanoj kaj por plenaĝuloj. La libroj aktualas eĉ por hodiaŭo malgraŭ, ke estis verkitaj antaŭlonge. La literaturan kreadon aprezis eminentaj verkistoj kaj kulturagantoj de Japanio kaj Ĉinio. Pri Eroŝenko eĉ nuntempe oni memoras, akurate eldonante liajn verkojn.

En 1956 en Tokio aperis esploro de la profesoro Takasugi Itiro “*Momoku no shijin Eroshenko*” (“La blinda poeto Eroŝenko”), en 1959 la sama aŭtoro preparis tiel nomatan “*Eroshenko zenshu*” (“La plena verkaro de Eroŝenko”) en tri volumoj. La unua volumo enhavas verkojn en la japana, la dua – en Esperanta, en la tria volumo estas artikoloj kaj rememoroj pri Eroŝenko. En 1982 aperis korektita kaj kompletigita eldono de la libro de Takasugi Itiro “La kanto antaŭ tagiĝo. Vivo de

blinda poeto Eroŝenko". La libro estas kompletigita per materialoj, kolektitaj far' de aŭtoro dum lia vojaĝo tra Sovetio en la jaro 1982. La verkoj de Eroŝenko estas inkluzivitaj en multvoluma biblioteko de japana literaturo por infanoj, artikoloj pri Eroŝenko estas en la enciklopediaj konsultlibroj.

La ekspozicion de la Domo-Muzeo riĉigas ilustraĵoj, bildoj de Staro-Oskolaj pentristoj, ankaŭ argilaj objektoj produktitaj laŭ verkoj de la verkisto.

Aŭtoro de la ilustraĵoj estas pentristino-restaŭristino Tatiana Krilova. Vico da argilaj objektoj estis faritaj laŭ verkoj "Floro de justo", "El vivo de la ĉukĉoj", "La vintra fabelo" (ruslingva titolo de "Vundo de la vorto "amo") produktitaj far' de argilmajstrino Valentina Pirjeva.

En la ekspozicio estas deponitaj objektoj de vilaĝa vivmaniero de la komenco de la 20-a jarcento, kiuj estis donacitaj al la Muzeo de loĝanoj de la najbaraj vilaĝoj – Babaninki, Gotovje, Novikovo, Gorodiŝĉe, Golofejevka. Temas pri buterigilo, ŝpinrado, bestokombilo, gladiloj, samovaroj. En la Domo estas rekonstruita rusa forno kun akompana ilaro: potoj, laktokruĉoj, gisvazoj kaj diversmezuraj lignaj potpreniloj, soklo por fritilo.

Inter meblaro estas kofro pli ol centjara. La lito estas kovrita per bunta litkovrilo kun bela manfarita bordero. Ankaŭ estas abundo da mantukoj originale broditaj laŭ loka brödmanniero.

Estas prezentita vira kostumo kun ĉemizo kaj pantalone el hela lintolo. La kostumon preferis surporti Eroŝenko. Ĝuste en la sama kostumo la samvilaĝanoj memoras lin: alta, en hela vesto, mirakle bonkora kun meditema rideto.

Malgraŭ ke epoko, kiam la verkisto vivis, forflugas de ni plu kaj plu, populareco de lia nomo plukreskas.

Elrusigis Anatolo Sidorov (Sankt-Peterburgo, Rusio) kaj Julia Patlan' (Kijivo, Ukrainio),
Scienca redaktado, korektado de Julia Patlan'

Rimarko: La adreso de la muzeo estas jena. Notu tamen, ke nur la rusa lingvo estas uzebla tie.

(poŝtokodo) 309545, Rusio, Belgoroda provinco, u. Starij Oskol, vilaĝo Obuhovka, Eroŝenka strato, domo 15

(*) Tiu portreto fare de Nakamura Tsune aperas en la dorskovrilo de tiu ĉi libro.

(La redaktanto)

(要約/resumo) オブホフカ村のエロシェンコ記念博物館での展示について

エロシェンコ記念博物館は、ロシアの Obukhovka にエロシェンコ生誕 100 年の 1990 年に造られた。2.4 ヘクタールの敷地の中央に彼の生家が再建された。2010 年には、その家の前に碑が建てられた。そこには、「生きた・旅した・書いた」とロシア語で書かれている。彼の一生は、正にその碑文にあるとおりである。作家・旅行者・教育者・エスペ란ティスト・音楽家であった彼の人生は、盲人にとってだけでなく、最も価値あるお手本ともいうべきものであった。生家には 20 世紀初



頭当時の中流家庭の家具などが置かれている。彼の家族が使っていた実物もある。博物館に入ると彼の胸像と肖像画が並んでいる。展示室をめぐって彼の生涯を紹介する。

第 1 室 (幼少時代) : 1890 年 1 月 12 日に 3 人兄弟・4 人姉妹の 3 番目の子として誕生、4 歳の時にはしかが原因で失明。暗闇の中の人生が始まったが、彼は立ちあがり、誰よりも上手に泳ぐなどができるようになった。そして彼の冒険に満ちた、生き生きした人生が始まった。

第 2 室 (モスクワ盲学校から、外国生活の青年時代) : モスクワ盲学校に通い、エスペラントを知って、イギリスの盲学校に 1912 年に留学した。その後、日本に向かい、さらにアジア放浪の後、再び日本に来る。しかし日本からは 1921 年に危険人物として追放された。

第 3 室 (作家・教師・エスペランティストとしてのエロシェンコ) 2 年間中国にいたあと、ロシアにもどり、シベリア、トルクメン、ウズベキスタンなど、ソ連の各地で過ごした。

第 4 室 (故郷への帰還) : 1952 年に故郷の村へ帰り、まもなく亡くなった。その後、高杉一郎氏、またロシア人により、彼の再評価があった。

(エロシェンコ博物館館長 Novikova Tatiana のロシア語文を Anatolo Sidorov と Julia Patlan' がエスペラント訳)

supra foto: la domo-muzeo

上掲の写真: エロシェンコ記念博物館 (1990 年開館)

Vasilij Eroŝenko kaj Esperanto

Anatolij Masenko (Rusio), prezidanto de LIBE*

* =Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj

Enkonduko

El jenaj punktoj la vivo de Eroŝenko rilate al Esperanto (=E-o) estas priskribata.

Por rusa blindulo Vasilij Eroŝenko (1890-1952) Esperanto iĝis tiu fabela ora ŝlosileto, kiu malfermis antaŭ li pordon en la vastan mondon. En 1911 klera instruistino s-ino Ŝarapova konatigis lin kun E-o kaj instigis al la unua eksterlanda vojaĝo Anglion (februaro-septembro 1912). Pli fruktodona estis lia dua vojaĝo fine de aprilo 1914 Japanion. Tie li multe kontribuis por reaktivigi la stagnantan E-movadon.

Post dujara vojaĝo tra Siam, Birmao kaj Hindio li denove trafas Japanion en 1919 kaj estas konata al la publiko ne nur kiel talenta japanlingva verkisto, sed ankaŭ kiel arda liberama oratoro. Rezulte kiel homo kun danĝeraj ideoj en junio 1921 li estis ekzilita el la lando al Vladivostoko, kaj en oktobro 1921 li estis akceptita kiel instruisto de Ŝanhaja E-Lernejo. Ekde marto 1922 li jam instruas E-on en la universitato de Pekino. Ĝuste en Ĉinio li debutis kiel originala E-verkisto. Li partoprenis la tri sinsekvajn Universalajn Kongresojn (Helsinki 1922, Nurenbergo 1923 kaj Vieno 1924). Eble fine de aŭgusto 1924 li por ĉiam revenis sian patrolandon. Li restas aktiva E-isto ankaŭ en Moskvo. Li instruas la lingvon al siaj geamikoj, plenumas interpretadojn, partoprenas SAT-kongreson en Leningrad 1926.

Firmajn kontaktojn havis Eroŝenko kun Harald Thilander, la redaktoro de "Esperanta Ligilo". Pli ol dek jarojn (1934-1945) li pasigis en Turkmenio, kaj eble tio savis lin de la persekutado pro E-o.

Frua tempo

Kiam nia karmemora Majstro d-ro L. L. Zamenhof estis kreanta sian projekton de la Internacia Lingvo, apenaŭ li pensis pri tio, ke ĝin uzos ankaŭ blinduloj. Tamen ĝuste blinduloj tiutempe eĉ pli ol vidantoj bezonis tian interkomprenilon, kiu helpus al ili solvi siajn multnombrajn vivproblemojn (interŝanĝo de informoj pri eblecoj por studi kaj labori, pri libroeldonado brajle kaj aliaj). Iu eĉ eldiris tiel: "se Zamenhof ne kreus Esperanton, ĝin nepre kreus la blinduloj mem".

Jam dum la tria Universala Kongreso de E-o en Cambridge, Britio (1907) estis pli ol dudek blinduloj el sep landoj. Ĝuste tiam okazis la historia renkontiĝo de la blinduloj kun Zamenhof mem, kiu varmkore salutis ilin. Al li respondparolis eminenta pioniro de la blindul-E-ista movado, s-ro Harald Thilander. Li interalie diris: "Nevidantoj uzadas E-on ĉefe kiel gravan, ege taŭgan laborilon, tre utilan en internacia kunlaborado".

Ankaŭ por mia fama samlandano Vasilij Eroŝenko (1890-1952), kiu estis blinda,

sed li ne deziris esti ankaŭ muta, E-o iĝis tiu fabela ora ŝlosileto, kiu malfermis antaŭ li pordon en la vastan mondon; dank' al E-o li akiris diversnaciajn fidelajn geamikojn. Vizitante tiun aŭ alian landon, li ĉiam klopodis ekposedi ties kulturon kaj lingvon. Fine Eroŝenko fariĝis vera poligloto, tamen lia tuta vivo estis ligita kun E-o.

Post Moskva blindulleternejo la 18-jara Vasilij komencis sian memstaran vivon kiel restoracia muzikisto. Tio, certe, ne povis lin kontentigi, ĉar li strebis plu lerni, arde deziris ekkoni la mondon, kiu lin ĉirkaŭas, kaj tre suferis anime, ne havante tian eblecon.

En jaro 1911 la feliĉa hazardo konatigis lin kun la instruistino pri fremdaj lingvoj s-ino Ŝarapova. Anna Nikolajevna Ŝarapova (1863-1923) estis bofratino de Pavel Birjukov, la disĉiplo kaj biografo de Lev Tolstoj. Ŝi estis aktiva E-istino, kaj ŝi mem esperantigis kelkajn verketojn de Tolstoj. Ŝin, tre kleran virinon, profunde kortuŝis la sopiroj de la blinda junulo. Ŝi konsilis al li unue lerni la anglan lingvon kaj poste iri Londonon, kie tiam estis plej elstara eduko de blinduloj per novaj, modernaj metodoj.

Sed en la tuta Rusujo Eroŝenko ne povis trovi brajlan lernolibron pri la angla, kaj malespere li lamentis pri tio al la instruistino en ĉeesto de ŝia 15-jara nevino, kiu estis E-istino. La bonkora knabino tre kompatis la blindan Vasilij kaj proponis, ke ŝi instruos al li E-on. Komenciĝis do la lecionoj. La surprizita knabino pli kaj pli admiris, ĉar ŝia lernanto havis neimageblan memorkapablon.

Kiel seka spongo la akvon, li suĉis en sin la lingvon: sufiĉis al li nur unufoje aŭdi la regulon, vorton, esprimon, por ke li neniam plu tiujn forgesu. Dum du monatoj li ellernis E-on bonege kaj parolis ĝin eĉ pli flue ol lia instruistineteto. De nun Eroŝenko regule vizitadas la moskvan E-klubon sur Lubjanskaja-ŝtrateto, konatiĝas kaj konversacias tie kun interesaj homoj.

Laŭ lia propra konfeso, lia unua eksterlanda vojaĝo estis instigita ne nur de s-ino Ŝarapova, ankaŭ de prof. Edmond Privat, kiu venis Ruslandon kun speciala misio: alvoki slavajn E-istojn partopreni la novefonditan regnon Esperantujon. Sekvis vigla interkorespondado kun anglaj ges-anoj. Kaj jen dum la malvarma februara tago 1912 Eroŝenko per trajno ekvojaĝis al malproksima Anglio. Menciindas, ke tiutempe la simila vojaĝo de sola blindulo estis vera sensacio.

Kaj la komenco estis iom konfuza, ĉar neniu renkontis lin en Varsovio. Feliĉe ĉe aliaj trajnoŝanĝoj en Berlin, Köln, Bruxelles, Kale kaj Duvr Eroŝenko estis renkontata de UEA-delegitoj kaj aliaj ges-anoj anticipe avertitaj de Ŝarapova; volonte ili helpis lin kaj eĉ konatigis lin kun rimarkindaĵoj de la koncernaj urboj.

En Londono Vasilij, ĉiam helpata de ges-anoj, perfektigas sian anglan lingvon kun la sama mirakla rapideco kiel E-on; dum du monatoj li studas en *Normal Royal College*, ofte vizitas bibliotekojn, akiras abundajn konojn multflankajn kaj poluras sian intelekton. En septembro 1912 li per-ŝipe revenas Peterburgon.

Japanio, Azio kaj Ĉinio

Ni ne scias kial, sed Japanio iĝis sekva vojaĝcelo de Eroŝenko, kaj reveninte Moskvon li fervore lernas japanan lingvon. Fine de aprilo 1914, komisiita de Rusa E-Federacio (REF), li tra tuta Siberio alvenis Tokion, kie lin varme akceptis tieaj s-anoj Nakamura Kiyoo, Osaka Kenzi kaj aliaj.

Japana E-Asocio fondiĝis en 1906. Sed kiam alvenis Eroŝenko, en la lando regis "vintro" de la socia vivo, stagnis ankaŭ E-movado. Fidelaj E-istoj tamen klopodis reaktivigi la movadon, kaj Eroŝenko multe kontribuis ĉi-rilate, montrante ĝian vivantecon. Unue li iĝis studento de la Blindula Kolegio en Tokio, kaj krom la masaĝarto li perfektigis en la japana lingvo kaj studis literaturon. Ankaŭ li instruis E-on al la blindaj studentoj. Ĉar forestis la lernolibroj en brajlo, la instruado okazis buŝa, akompanata de ludoj kaj kantoj. Post nelonge li okazigis E-kurson en la blindullernejo en Oosaka. Elinter liaj kursanoj elkreskis tiaj elstaraj pioniroj de blindula movado, kiel Torii Tokuziro, Iŭahaŝi Takeo, Kumagai Tecutaro^(*) kaj aliaj.

En 1916, post la 9-jara interrompo, en Japanio okazis la tria E-kongreso, en kiu Eroŝenko parolis pri mondpaco, bahaismo kaj esperantismo, kaj ludante balalajkon, li plenumis rusajn popolajn kantojn. Ne, li mem ne fariĝis bahaisto, sed el la angla li E-igis kaj publikigis ankoraŭ en 1915 la "Kaŝitajn vortojn" de Baha'u'llah, la fondiinto de tiu ĉi religio.

Por aranĝi la propagandajn kunvenojn kaj koncertojn Eroŝenko vojaĝis al la okcidenta landparto, kaj tute ne pri sia poŝo li zorgis!

Jen ekzemple kion li skribis al sia intima amiko Torii Tokuziro antaŭ la E-aranĝo en Kioto: "Oni devas aranĝi ĉion tiel, ke ni povu gajni iom da mono. Tiun ĉi monon mi donacos al la blindaj E-istoj de Japanujo, mi nenion prenos por mi mem" (el la letero de Eroŝenko de la 21.jun.1916).

Post dujara vojaĝo tra Siamo, Birmao kaj Hindio Eroŝenko denove trafis Japanion en 1919. Intertempe gravaj ŝanĝoj okazis en la mondo: finiĝis la dua mondmilito; en Rusio venkis bolŝevikoj, kaj en Japanio plivigliĝis socialistoj, inter kiuj li havis multajn amikojn. Nun Eroŝenko estas konata al la publiko ne nur kiel talenta japanlingva verkisto, sed ankaŭ kiel arda liberama oratoro dum la mitingoj de socialistoj. Rezulte kiel homo kun danĝeraj ideoj li estis ekzilita el la lando Vladivostokon, kie regis tiam blankuloj.

Estis junio 1921. En la skizo "Adiaŭ Japanio!" Eroŝenko rememoras: "Vladivostokaj E-istoj bone konis min kaj renkontis tre gastame. Ili estis ege indignitaj per tio, ke oni forpelis min el Japanio, kaj ili deklaris, ke ili rakontos al la tuta mondo pri la kontraŭleĝa ago de la japana registaro. Prezidanto de la E-societo proponis al mi loĝi ĉe li ĝis kiam en Rusio ĉio trankviliĝos".

Kaj eĉ tie ĉi li ne forgesas siajn E-amikojn en Japanio.

En la letero, sendita el Vladivostoko la 12.jul.1921 al Akita Uzyaku, ni legas: "Tie ĉi mi eksciis, ke nun en lernejoj de la laborista-kampana Rusio estas bone organizita E-instruado. Ĉu eble ankaŭ vi okupiĝos pri E-instruado al miaj karaj

japanaj studentoj? Interalie, pli ofte rakontu pri E-ismo. Se feliĉo ridetos al mi, kaj bonorde mi atingos Ĉita-n, eble oni direktos min kiel delegiton de la loka E-societo al la 13-a UK en Praha".

Ne, ankaŭ ĉi-foje la sorto al li ne favoris, ial oni malpermesis al li eniri Sovetlandon. En oktobro 1921 Eroŝenko jam paŝadis tra la stratoj de orienta urbo-giganto Ŝanhajo. Nelonga estis lia restado en Ĉinio, ne pli ol unu kaj duonjaro, sed tre fruktodona kaj memorinda. Ankaŭ tie ĉi li trovis sincerajn kaj helpemajn amikojn.

En Ŝanhajo Eroŝenko malkomforte loĝis en iu masaĝejo, sed varmkore lin zorgis s-ano Hujucz, tiea UEA-delegito kaj juna literaturisto. Tuj Eroŝenko estis akceptita kiel instruisto de la E-a Lernejo fondita en 1920. Hujucz en ĵurnalo aperigis sian artikolon "Pri blinda poeto Eroŝenko".

Alia granda ĉina verkisto kaj fervora subtenanto de la Lingvo Internacia, Lu Sin ankaŭ esprimis sian simpatian al Eroŝenko. Ankoraŭ antaŭ ilia persona renkontiĝo Lu Sin tradukis kelkajn liajn japanlingvajn verkojn, kaj kune kun Hujucz en januaro 1922 li eldonis ĉinlingve "Fabelaron de Eroŝenko" en Ŝanhajo. Komence de 1922 en Pekino Lu Sin kaj Eroŝenko persone renkontiĝis kaj interamikiĝis. Eroŝenko ekloĝis ĉe Lu Sin, kaj, laŭ rekomendo de Lu Sin kaj lia frato Zhou Zouren (ambaŭ profesoroj de Pekina Universitato), ekde marto 1922 ankaŭ Eroŝenko fariĝis docento de la ĵus fondita kurso de E-o. Li prelegis pri E-o kaj rusa literaturo, kaj lia interpretisto estis E-isto prof. Zhou Zouren.

Krom la universitato, Eroŝenko multe prelegis ankaŭ en la superaj lernejoj. Liajn paroladojn en ĉina traduko oni eldonis en 1924.

Por ni gravas, ke ĝuste en Ĉinio Eroŝenko debutis kiel originala E-verkisto. Jam en Ŝanhajo li verkis "Turo por fali" kaj "Unu paĝeto en mia lerneja vivo". En Pekino li daŭrigis la verkadon en E-o, kaj tiuj verkoj estis kolektitaj en la libron "Ĝemo de unu soleca animo" eldonitan en Ŝanhajo 1923. Kelkaj liaj propagandaj artikoloj aperis en ĉinaj E-revuoj "La Verda Ombro" kaj "La Verda Lumo", ekzemple la detale argumentita artikolaro "La neceseco de komuna lingvo" en aŭgusta, septembra kaj oktobra numeroj de la revuo "La Verda Ombro".

En hejma arkivo de Nianila Jakovlevna, la fratino de Vasilij Eroŝenko, estis lia fotoĵo, sur kiu la patro surskribis jenan adreson (ruslingve): Ĉinio. Pekino. Registara nacia universitato. Al prof. de E-o V. Eroŝenko.

Kiel oficiala reprezentanto de la universitato Eroŝenko partoprenis la tri sinsekvajn Universalajn Kongresojn (Helsinki 1922, Nurenbergo 1923 kaj Vieno 1924). S-ano I. Bril el Ĥarkovo siatempe rakontis, ke el eksterlando li ricevis la tipografie eldonitan bildkarton pri la 15-a UK en Nurenbergo. Apud la kongresejo staras grupo da E-istoj, kaj al ili proksimiĝas blindulo kun bastono kaj dorsosaketo. Tiu estis V. Eroŝenko. La bildkarton s-ano Bril pruntis al la verkisto s-ano I. Sergejev, kiu bedaŭrinde mortis ne resendinte ĝin.

Interese rememoras la fama hungara E-isto Kolomano Kalocsay: "En mia memoro aperas la figuro de tiu blindulo-poeto. En 1923, en la Nurenberga

kongreso, per decidaj paŝoj suriris la podion tiu alta rekta viro kun abundaj, helblondaj haroj, fermitaj palpebroj, melankolia rideto sur la iom pala vizaĝo. Li deklamis per tre sugesta voĉo sian poemon "Antaŭdiro de la ciganino". La aŭdantaro estis surprizita kaj tute konkerita, tiel ke la juĝantaro, gvidata de Edmond Privat, donis al li la unuan premion por la plej bona E-prononco. Verdire, tiu prononco ne estis tute modela: la konsonantoj ofte estis tro molaj, la akcentaj vokaloj ofte sonis tro mallonge kaj akrafrappe, sed la artismo de la prezento kaj la emocikirla enhavo de la poemo estis nerezisteblaj".

Eŭropo, kaj fine Rusio

Post la 15-a UK Eroŝenko ne plu reiris Pekinon. Li restis en Eŭropo, vivis inter E-istoj en Germanio kaj Francio. Tiun ĉi periodon bonege priskribis Otto Baessler en "Paco", n-ro 7-8/1970.

Laŭ la protokolo, Eroŝenko aktive partoprenis kelkajn diskutojn dum la 16-a UK en Vieno 1924. Liaj hungaraj blindaj amikoj s-anoj Lantos kaj Ulmer, kiujn mi renkontis en Budapeŝto dum la 51-a UK 1966, rememoris jenan neordinaran epizodon: "Dum la ferma kunsido de la UK iu fama rumana ĵurnalisto tre entuziasme parolis pri tio, ke li instruas E-on al la policistoj. Dum li flamis pro la entuziasmo, laŭdante afablecon de la policistoj, Eroŝenko ekstaris kaj kriis: "Honto, honto! Mi ne ĉeestos tiun kongreson, kie oni parolas pri policianoj. Mi havas nenion komunan kun la policianoj!" Kaj li komencis bati la tablon kaj brue foriris.

Post la kongreso, eble fine de aŭgusto 1924, Eroŝenko por ĉiam revenis sian patrolandon. Sed li restas aktiva E-isto ankaŭ en Moskvo. Li instruas la lingvon al siaj geamikoj. Li plenumis interpretadon por s-ino Emilie Suĥardova, kiu en 1925 venis el Ĉeĥoslovakio kiel reprezentantino de Komintern kaj eĉ salutis la fondon kongreson de VOS (Tutrusia Blindul-Asocio). Li helpis prepari E-programojn de Moskva radio Komintern por eksterlando.

Blinda s-ino A. I. Iljina siatempe rakontis al mi, ke ŝi kune kun Eroŝenko partoprenis SAT-kongreson, kiu okazis en Leningrad dum aŭgusto 1926. Unue elpaŝis li mem, rakontante al eksterlandanoj pri vivo de blinduloj en Sovetunio; kaj poste li instigis, ke ankaŭ Anna Iljina parolu pri eblecoj de sovetaĵ blindaj virinoj.

En oktobro 1927 kiel gasto ĉe la deka datreveno de la Oktobra Revolucio vizitis Moskvon Akita Uzyaku, fama japana dramverkisto kaj E-amiko de Eroŝenko. Li restis en Moskvo ĝis la printempo 1928, kaj preskaŭ ĉiutage Eroŝenko vizitis la malnovan amikon, helpis lian ekzercadon en la rusa lingvo. Eroŝenko helpis pretigi la manuskripton de la radio-prelego pri japana proleta literaturo en E-o, kun kiu Akita elpaŝis en januaro 1928.

Firmajn kontaktojn havis Eroŝenko kun Harald Thilander, la redaktoro de "Esperanta Ligilo". Ankoraŭ en 1924 en la revuo aperis lia novelo "Stranga kato". Dum tridekaj jaroj li publikigis tie siajn skizojn pri vivo de blinduloj en Uzbekio, Armenio, pri blinda verkisto A. P. Belorukov, kaj en la stenografia angulo aperis la novelo de Belorukov "Voĉoj de la strato", kiun el la rusa E-igis Eroŝenko. Post lia

vojaĝo al la ekstrema Nord-oriento de Siberio en "Esperanta Ligilo" 1933 aperis tuta serio de la skizoj sub titolo "El vivo de la ĉukĉoj". Lasta skizo "La trimova ŝakproblemo" estis eldonita libroforme kiel suplemento al "Esperanta Ligilo" 1947. La aŭtoro i. a. skribas tie: "Ĉi tiun skizon mi verkis speciale por nia "Esperanta Ligilo" kaj dediĉas ĝin al miaj E-istaj amikoj de la Malproksima Oriento". Al ĉukĉa kulturbazo Eroŝenko venis fine de julio 1929, kaj jen kiel li tion priskribas: "Kiam mi ankoraŭ estis je distanco de multaj centmeiloj de la bazo, la bazanoj jam sciis pri mia alveno. La ĉukĉoj entuziasme rakontadis al ili, ke venas norden mirinda blindulo por viziti sian fraton, ke la blindulo vizitis multajn landojn, sed amas nur unu nekonatan al ili landon Esperantujon; ke li scias kelkajn lingvojn, eĉ la amerikan, sed preferas al ĉiuj la internacian lingvon E-on".

Ĉe la centra estraro de VOS ĝis 1932 funkciis E-sekcio, kiu brajle eldonis kelkajn lernolibrojn de E-o kaj du numerojn de la socipolitika kaj literatura almanako, destinita por eksterlandaj E-istoj. En la almanako mi trovis ankaŭ tradukaĵojn, faritajn de Eroŝenko.

En "Esperanta Ligilo" por aprilo 1933 Eroŝenko anoncas: "Karaj samideanoj! VOS komisiis al mi antaŭ nelonge ordigi leterojn venintajn el alilando. La tre gravajn mi tradukis plene kaj transdonis al la estraro de VOS, kaj nun pri respondo al ili mi tute ne estos respondeca. Al kelkaj leteroj mi respondis kun la konsento de la estraro de VOS. Aliajn leterojn, en kiuj oni petis aŭ demandis pri la "Almanako", mi metis en ordon kaj notis adresojn por la VOS. En kelkaj leteroj konatoj kaj nekonatoj demandas VOS pri mia adreso. Jen ĝi estas: Arbat 7, Tipografia OGIz n-ro 19, Moskva, USSR. Mi estas korektisto en la presejo (OGIZ estas "ŝtatpresejo") kaj laboras ankaŭ kiel neoficiala tradukisto ĉe VOS. Mi loĝas en Moskvo, sed ĉiam serĉas pretekston por forgliti kamparen. Kiam mi estas en Moskvo, mi volonte korespondas kun alilandaj s-anoj, sed kiam mi loĝas kampare aŭ vagadas laŭlonge kaj laŭlarĝe de Sovetlando, korespondi kun alilando pro kelkaj kaŭzoj mi tute ne povas..."

Kaj nun ni transiru al vere unika vivperiodo de Eroŝenko, kiam li pli ol dek jarojn (1934-1945) pasigis en Turkmenio, la plej suda ekstremo de Sovetio, dediĉinte sin al la pedagogia agado por blindaj infanoj. Ekstere tiam furiozis la "granda purigo" de la Stalina reĝimo kaj la dua mondmilito. La sovetaj E-istoj estis persekutataj kaj pereigataj. Certe, la personeco de Eroŝenko estis ankaŭ suspektinda, oni kontrolis liajn privatajn leterojn; anstataŭ la lernejo-direktoro li fariĝas simpla instruisto.

Jen estas fragmento el lia letero al blinda s-ano Ĉernecki el Minsk (la ruslingvan leteron E-igis mi. - A. M.)

"Kuŝka. 07.apr.1940. ... Skribu al mi ruse. E-o ĉe ni ne estas moda; ĉiuj centraj E-institucioj estas fermitaj, kaj multaj funkciuloj estas arestitaj kiel spionoj kaj perfiduloj. Tial ankaŭ ĉe mi ĉesis ĉiuj kontaktoj kun miaj eksterlandaj amikoj. Nur malofte mi ricevas "Esperantan Ligilon". Ĉu vi ricevas ion el eksterlando?"

Se vi legis "La trimovan ŝakproblemon", tiam vi atestos, ke la skizo estis

reverkita ĝuste en tiu terura jaro 1937, do estis necesa granda civitana kuraĝo por tiel akre kritiki la putriĝantan burokratismon en la lando.

En "Aŭroro", n-ro 2/1975 oni rakontis, kiel E-istiĝis ĉeĥa blinda muzikisto František Brezina: "En la tridekaj jaroj la rusa verkisto Eroŝenko aperigis en "Esperanta Ligilo" anonceton, per kiu li serĉis blindan muzik-instruiston-E-iston por la de li estrata blindulternejo en Turkmena respubliko de Sovetunio. František, tiam muzikstudento en la blindulternejo de Brno, tuj eklernis la internacian lingvon kaj anoncis sin por tiu posteno. Tamen fine li ne ricevis ĝin, ĉar montriĝis, ke la sovetaj aŭtoritatoj ne pretis okupigi la muzikinstruiston eksterlandan. E-o tamen fariĝis lia amo por la tuta vivo".

Durdy Petkulajev, unu el la lernantoj de Eroŝenko, kiu poste multajn jarojn prezidis la Turkmenan Blindul-Asocion, rememoris: "Eroŝenko al multaj instruis E-on. Por ĉiam mi memoras la frazon: "Ĉu vi estas telegrafisto?" La frazo estas ligita kun jena okazintaĵo. Kiam ni laŭ bordo de la rivero provizis lignaĵojn por vintro, mi subite mispaŝis kaj falis la riveron. Naĝi mi ne scipovis, tial mi malespere kriante petegis la helpon. Vasilij Jakovleviĉ tuj reagis: "Durdy, ne timu, tamen kriegu, kriegu! Laŭ la krio mi naĝos". Kaj kiam li atingis min, li diris trankvile: "Sufiĉas kriegi, vi ja timigos la riveron".

Poste, sur la bordo ni ambaŭ sekiĝis, kaj mi neniel povis ĉesigi la nervan febron, la dentoj klakis kvazaŭ Morse-aparato. Vasilij Jakovleviĉ ekridis kaj diris: "Ĉu vi estas telegrafisto?"

Fine ni turnu nin al la rememoroj de Zinaida I. Ŝamina, proksima amikino de Eroŝenko en Moskvo: "Post la milito li skribis al Stalin leteron, la kuraĝan kaj saĝan. Kaj li ricevis respondon el la sekretario de Stalin, en kiu oni klarigis al li, ke Stalin komprenas, kian signifon povus havi E-o, tamen nun ĝi estas ne taŭga por interrilatoj en aliaj landoj. Dum la antaŭlasta revido Eroŝenko diris al mi: "Vi estas feliĉa! Vi ĝisvivos ĝis la tempo, kiam nia bona E-o venkos". Mi dubis. "Kredu kaj iom agu! - diris li".

Tiuj vortoj estu sankta testamento ankaŭ por ni, por tiuj, kiuj ne nur surbruste, sed ankaŭ en la koro ĉiam portas verdan lumon de l' espero.

En sia vivo Eroŝenko estis verkisto, lingvisto, pedagogo, muzikisto, masaĝisto kaj eĉ bona ŝakisto. Jen kiajn vastajn sciojn kaj interesojn posedis tiu talenta homo. Kaj ĉi ĉion li akiris dank' al sia persista laboro kaj E-o, dank' al la verda steleto, pri kies mirakla efiko li diris: "Jes, mi nun povas diri, ke la lampo de Aladino ne povus helpi al mi pli, ol la verda E-ista steleto; mi estas certa, ke neniuj geniulo de arabaj fabeloj povus fari por mi pli, ol la geniulo de la reala vivo doktoro Zamenhof, kreinto de E-o".

(*) Laŭ japana fonto, Kumagai ne estas kursano de Eroŝenko. Li tamen preparis prelegon de Eroŝenko okaze de la vojaĝo al Kansai. (de la redaktanto)

（要約/resumo） エロシェンコとエスペラント

エロシェンコは 1911 年に、ビリューコフの親戚アンナ・シャラーポヴァと知り合い、彼女にエスペラントを習った。エスペラントはエロシェンコにとって新たな世界を開く「金の鍵」となった。彼はモスクワのリュビャンカ通りにあったエスペラントクラブに通った。シャラーポヴァそしてモスクワを訪れたエドモン・プリヴァの影響で、彼は外国行きを決意し、1912 年 2 月に英国へと旅立った。ロンドンの Normal Royal College で学んだが、まもなく 1912 年 9 月にはロシアに戻った。日本語を熱心に習得した後、1914 年 4 月末ロシアエスペラント連盟の後押しを受けて日本に渡った。中村精男ら日本のエスペランティストが彼を受け容れた。1915 年、彼はバハイ教の書を英語からエスペラントに訳して出版した。1916 年には第三回日本エスペラント大会で講演している。1921 年日本から追放された彼をウラジオストクのエスペランティスト達が世話した。1921 年 10 月彼は上海に行き、UEA 代表の胡愈之に迎えらる。1922 年彼は魯迅・周作人兄弟の家に居住、北京大学でエスペラントとロシア文学の教鞭をとる。まさに中国において、彼はエスペラント作家となり、一連のエスペラント作品を発表した。1922 年、23 年、24 年のエスペラント世界大会には彼は中国の大学の公式代表として出席している。1923 年にはカロチャイ、プリヴァらが審査員を務める朗読部門の最優秀賞を彼は受賞した。1924 年彼はソ連に戻った。彼はコミンテルンのモスクワ放送エスペラント番組に協力した。彼は「Esperanta Ligilo」誌の編集者 Harald Thilander との連絡を維持し、彼のエスペラント作品はそこに掲載されていった。1933 年彼は「全ロシア視覚障害者協会」(VOS) のエスペラント部門に勤めるため、外国からの通信を受信する任務についた。1934 年から 1945 年彼はトルクメニスタンの盲学校で働いた。当時粛清の嵐がエスペランティスト達を襲っていた。彼は当初校長であったが、粛清の中で一教員に格下げされた。彼はエスペラントを通じて各種の技能を身につけ世界で活躍した。「アラディンの魔法のランプでも緑のエスペラント星に及ばない」と彼は言う。

（アナトリー・マセンコ）

Edukista Dimensio de Eroŝenko

TANABE Kunio

(verko je unua premio en la konkurso* de LIBE** kaj REAN***,
publikigita en 2011)

* = Literatura konkurso pri la temo "Vivo kaj verkoj de
Vasilij Eroŝenko: ilia signifo kaj valoro por la nuntempa blindulo"
** = Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj
*** = Rusia Esperanto-Asocio de Nevidantoj

Enkonduko

Antaŭ preskaŭ 50 jaroj, kiam mi, 17-jara, estis en supera mezlernejo por blinduloj en Tokio, dirante "Vi havas tian antaŭulon de nia lernejo", unu instruisto prezentis al ni unu libron titolitan "Vivo de Eroŝenko: Blinda Poeto" verkitan de Takasugi Iĉiro. Mi tuj kuris al brajla biblioteko kaj legis ĝin. Interese! La vivo de Eroŝenko kortuŝis min profunde, ĉar tiutempe mi estis ĉagrenata pri mia estonteco. Eroŝenko donis la lumon en mian koron.

Ĉi-foje releginte tri biografiojn kaj kelkajn originalojn Esperantajn de Eroŝenko, mi eksciis, ke li estis ne nur blinda verkisto sed ankaŭ instruisto, kiu praktikis edukadon kun propra ideo tra sia vivo. Mi trovis, ke kaj lia vivo kaj liaj praktikoj donas al ni, blindaj posteuloj, multajn pensindaĵojn. Ekzemple:

1. Lia vivkapablo
2. Lia ideo pri lerneja edukado

Mi prezentu konkretajn ekzemplojn de la supraj du punktoj el la biografioj.

1. Vivkapablo

Laŭ mi el la vivkapablo de Eroŝenko jenaj kvar kapabloj estis karakterizaj: Kapablo moviĝadi sendepende; Kapablo uzi brajlon; Kapablo akiri fremdan lingvon; Kapablo praktiki arton.

(1) Kapablo moviĝadi sendepende

Surprizis min la priskriboj en la biografioj pri lia povo libere iradi kie ajn. Kompreneble komence li devis esti akompanata, sed lernis la vojon tuj. Verŝajne li havis atentemon pri direkto, distanco kaj la totala mapo.

Urbo Tokio estas grandega kaj komplikega. En tia urbego Eroŝenko, kvazaŭ vidanto, ĝuis promenadi sola. En sia infaneco dank' al la kuraĝigo fare de la familio kaj la naturriĉeco de la naskiĝloko, li trejniĝis moviĝadi sendepende. Krome li ankaŭ ĝuis naĝadon kaj rajdadon. Surbaze de tio lia kapablo libere moviĝadi evoluigis poste.

(2) Kapablo uzi brajlon

Li ĉiam kunportadis brajlan tajpilon. En la tempo de Eroŝenko eĉ en Moskvo troviĝis nur du aŭ tri el mil blinduloj, kiuj kapablis uzi brajlon. En Londono li vizitis

brajlan bibliotekon kaj ĝojegis trovinte multegon da brajlaĵoj. Li fariĝis fervora libroamanto.

Korespondado per brajlo estis tre grava por Eroŝenko vojaĝanta de lando al lando en la tempo sen internacia telefonservo.

Registrado de popolfabeloj kaj verkado de propraj fabeloj ebligis per brajlo. Legi kaj skribi brajle konsolis lin vivanta sola fremdlande.

(3) Kapablo akiri fremdan lingvon

Lerninte Esperanton, li ĝojis aparteni al Esperanto-rondo en Moskvo kaj en ĝi konatiĝis kun kaj intelektuloj kaj artistoj kaj eksterlandanoj. Uzante Esperanton, li realigis vojaĝojn al eksterlando kaj ĉie unue akiris amikojn Esperantistajn, kiuj helpis lin lerni lokajn lingvojn. Li alproprigis fremdajn lingvojn sen lernolibroj sed tra ĉiutaga vivo. Ekzemple, en Tokio li ofte vizitis kun amikoj teatron kaj kinon, tra kiuj li absorbis vivantan lingvaĵon. Ju pli bone lia lingvokapablo kreskis, des pli la rilatoj kun amikoj vastiĝis.

Kial li povis akiri lingvon en tre mallonga tempo? Ĉar li havis grandajn scivolemon kaj kuraĝon. Li ŝatis diskuti pri kio ajn eĉ en fremda lingvo.

(4) Kapablo praktiki arton

Escepte de brajla tajpilo li ĉiam kunportadis ankaŭ muzikinstrumenton balalajko. En la Blindullernejo de Tokio dum Esperanto-kurso, kiam lernantoj laciĝis, li ludis balalajkon kaj kantis aŭ Esperante aŭ ruse. Kiam ardiĝis diskuto, lia ludo de balalajko kvietigis la atmosferon.

Krome, de tempo al tempo, sopirante naskiĝlokon, li ludis balalajkon por si mem. Por li vivanta sola fremdlande balalajko bone efikis por forigi la streson de la vivo.

2. Lia ideo pri lerneja edukado

Eroŝenko funkciis kaj kiel instruisto kaj kiel konsilanto por blindaj infanoj kaj junuloj. Kiel ekzemplojn ni vidu liajn laborojn en Birmo, Siberio kaj Turkmenio.

(1) Moulmein, Birmo

Eroŝenko deziris starigi lernejon por blinduloj en Sudorienta Azio. En 1916 li, ankoraŭ 26-jara, ekvojaĝis el Tokio.

Unue li celis al Bankoko, Siamo (la nuna Tajlando). Tie li trovis nek rimedojn nek kunlaborantojn por starigi lernejon por blinduloj. Sekve li plu vojaĝis al Birmo (la nuna Mjanmaro). En la urbo Moulmein, li komencis praktiki edukadon laŭ sia ideo. Tiea blindullernejo estis ĉefe ludejo kaj foje laborejo por fari bambukorbojn kiel vendaĵojn. Eroŝenko proponis plibonigan projekton kaj ĝi estis aprobita.

Li enkondukis multe da novaj ideoj. Por infanoj eksterdoman aktivadon: sendependa moviĝado; naturobservado per la tutkorpa senso. Por mezlernejanoj, utiligante sian sperton en Londono, altnivelajn instruadojn: muziko, masaĝo kaj la angla lingvo. Aldone, de tempo al tempo, li organizis prelegojn de instruistoj el

altnivelaj lernejoj. Plie li invitis gepatrojn kaj najbarojn al la lerneja kultura festivalo. En ĝi li mem kantis kun balalajko. Li sukcesis eltiri monon el la lerneja administra komitato por aĉeti brajlpaperon por lernomaterialoj. Li, vokata "Fraĉjego", estis amata de lernantoj.

Bedaŭrinde lia praktiko en Birmo daŭris nur unu jaron. Sed por Eroŝenko la sperto en Birmo fariĝis modelo por posta praktiko.

(2) Duoninsulo Ĉukotko, Siberio en Sovetio

En 1929 Eroŝenko vojaĝis al Duoninsulo Ĉukotko en la ekstremo de Nordorienta Siberio. Pri siaj tieaj spertoj li verkis kelkajn verketojn en Esperanto, kiuj aperis en "Esperanta Ligilo" en 1933 kaj en 1947.

En la antaŭparolo de la verketo "Blindaj Ĉukĉoj" li skribis: "Unu el la taskoj, kiujn mi metis antaŭ min, vojaĝante al la lando de la ĉukĉoj, estis ekkoni la vivmanieron de la blinduloj en tiuj malproksimaj arktaj regionoj."

Li renkontis du blindajn junulojn kaj interparolis kun ili. La dialogo estas tre impresa por mi. Lia sinteno kontraŭ ili estis sincera kaj serioza. Eroŝenko diris jene.

Al Filip: "La ĉefaĵo estas ne la blindeco mem, sed la viduloj, kiuj ne donas al ni eblecon labori kaj perlabori nian ĉiutagan panon kaj vivi sendependan vivon."

Al Kejgin: "Tie, en Moskvo oni ne bezonas la dancon de rosmaro. Knabinoj ĉe ni edzimiĝas al tiuj, kiuj scias kaj povas labori, sed ne danci. Tamen mi estas certa, ke se miaj moskvaj kamaradoj bezonus eklerni la dancon de rosmaro, ili sendube ĝin lernus..."

Kia simpatio! Kia kuraĝigo al junuloj!

Du junuloj revigliĝis. Eroŝenko, blinda, estis bona konsilanto por samsortanoj.

(3) Kuŝka, Turkmenio en Sovetio

En 1934 li venis al Turkmenio. Dum oni preparis establi blindullernejon, li lernis la lokan lingvon kaj vizitante vilaĝojn persvadis gepatrojn por sendigi blindajn infanojn al lernejo. Li ankaŭ konvinkis sian kolegon, bonegan instruiston de muziko, kunlabori en la lernejo. Ŝi venis eĉ kun sia edzo.

En Kuŝka Eroŝenko laboris kaj kiel administranto kaj kiel instruisto, de 1935 ĝis 1944. En lernejo "Domo de Blindaj Infanoj" li kunvivis kun infanoj kaj estis ame vokata "Paĉjo". La aktivado de la lernejo estis preskaŭ sama kiel tiu de lernejo en Birmo. En moviĝado li igis infanojn iri eĉ sen bastono. Agrikulturo kaj bestobredado estis inkluzivitaj anstataŭ masaĝo. Li surprizis lokajn loĝantojn per la prezentado de infana opero.

Lia praktikado en Kuŝka daŭris naŭ jarojn, donante multe da influo kaj al lernantoj kaj al la loka komunumo.

Konklude

La vivo de Eroŝenko estis vere unika kaj kuraĝa.

Li lernis en tri blindullernejoj kun malsamaj karakterizoj: en Moskvo, Londono

kaj Tokio. Li vojaĝis kaj loĝis en multaj landoj de malsamaj kulturbazoj: Britio, Japanio, Tajlando, Mjanmaro, Hindio, Ĉinio, eŭropaj landoj kaj ankaŭ landoj en Sovetio. Li renkontis multajn etnojn, kaj lernis iliajn lingvojn kaj vivmanierojn. Li amikiĝis ne nur kun blinduloj sed ankaŭ kun vidantoj. Li faris diversajn agadojn: ekz. vojaĝi, lerni, diskuti, kanti, rakonti, ludi, verki, instrui, kolekti, administri ktp., ktp. Post la reveno al Moskvo, Sovetio, li ofte vojaĝis enlande al diversaj respublikoj kaj laboris ĉefe kiel instruisto.

Kio ebligis al li travivi tiel unikan kaj kuraĝan vivon? Tio estis nenio alia ol lia elstara vivkapablo kaj aparte granda scivolemo. Verŝajne li pensis, ke estas necese al blindulo ĉion en la vivo senti per ĉiuj siaj sensoj, senti en sia koro kaj cerbumi en sia kapo. Dank' al sia riĉa vivkapablo, li realigis la vivon; la enhavoriĉa vivo plu evoluigis lian vivkapablon; la evoluiginta vivkapablo plu riĉigis lian vivon tra ĉiutagaj spertoj.

Surbaze de siaj spertoj li praktikis porblindulan edukadon kaj al infanoj kaj al junuloj. Kunvivante kun lernantoj en ĝojiga kaj libera etoso, li trejnigis ilin pri vivkapablo.

Mi pensas, ke la nuntempa edukado por blindaj infanoj ŝanĝiĝis multe de la tempo de Eroŝenko kaj frontas multajn problemojn. Koncernatoj de la edukado povas lerni multon el la ideo kaj la praktiko de Eroŝenko.

Mi esperas, ke ankaŭ infanoj blindaj interesiĝu pri la vivo de Eroŝenko, kiu certe kuraĝigos ilin kaj donos la lumon al ili.

Unika kaj kuraĝa vivo de Eroŝenko kortuŝis min antaŭ preskaŭ 50 jaroj kaj nun denove kortuŝas min eĉ pli forte.

Eroŝenko restas ĝuste la modelo de mia vivo.

(fino)

(要約/resumo) エロシエンコの教師としての側面

筆者は17歳の時、高杉一郎著『盲目の詩人エロシエンコ』（新潮社1956）を読み、彼の行動力に同じ視覚障害者として感動してしまった。今回、改訂版『夜明け前の歌 盲目の詩人エロシエンコ』（岩波書店1982）を読み直してみて、彼が童話作家、詩人というだけでなく、盲教育に強い関心を持ち、実際に長い期間各地で教師として実践していたことを知った。エロシエンコは、モスクワ、ロンドン、東京での自らの盲学校体験をもとに、盲児盲青年に対し、独立して生きていける生活力を身につけさせる彼独自のカリキュラムも作っている。何よりも自らその教育の良い手本を示している。（田辺邦夫）

Esperanto kiel “Universitato” por Eroŝenko

SASAKI Teruhiro

Antaŭparolo

Agadaj sferoj de Eroŝenko estis diversaj. Unue, kiel blindulo, li influis sur edukadon por japanaj blinduloj. Ankoraŭ nun lia merito estas granda kaj li estas unu el brilaj steloj por blinduloj en Japanio. Li montris al blinduloj, kiel eduki sin alte, kio eblas al blinduloj. Unu el liaj eternaj temoj estas “reviviĝo el malespero”. Li skribis en “Blindaj Ĉukĉoj” pri malĝojo de blindiĝo. Sed Eroŝenko montris per sia sperto, ke la vivo povas ekflori eĉ de la malespero. Li dediĉis sin al la edukado de blinduloj tra sia tuta vivo, en Japanio, sud-aziaj landoj kaj en Sovetio.

Due, li verkis japane kaj Esperante multe da ĉarmaj rakontoj kaj fabeloj, ankoraŭ nun ŝatataj de japanoj, ĉinoj kaj Esperantistoj. Por japanaj legantoj liaj fabeloj estas unuj el plej altaj je ĉarma enhavo kun nobla ideo. Feliĉaj estis idoj en Japanio kaj Ĉinio, ĉar ili havis en siaj lingvoj tiel alt-kvalitajn fabelojn de Eroŝenko, same kiel de Marŝak, Saint-Exupery, Michael Ende... Eblas diri, ke Eroŝenko altigis nivelon de la ĝenro de japanlingvaj fabeloj, ankoraŭ ekzistanta en lulilo en la unua kvarono de 20-a jc. Poste ekaperis multaj fabel-verkistoj en Japanio, sed ili ankoraŭ ne atingas tian altecon je la ideo enhavo. Tial do tradukis liajn fabelojn el la japana la plej granda ĉina verkisto, Lusin.

Trie, li estis nobla pensulo kaj kavalireca aktivisto por plibonigo de la mondo, kvankam li mem ne lernis en iu alta lernejo. Laŭ mia opinio, li heredis la bonan tradicion de rusaj narodnikoj en 70-aj jaroj 19-a jc. Tial do li povis eniri en popolon (*v narod!*) kaj inteligencion de Japanio, Ĉinio kaj Aziaj landoj. Helpis al li la agadon ankaŭ la talento, ke li mem estis bona muzikisto, kantis kaj ludis muzikilon bone. Kvare, plej bona kaj riĉa fonto por lia personeca edukado estas Esperanto. Per Esperanto li akiris amason da amikoj. Eblas diri, ke Esperanto estas lia universitato. Homaranismo de Zamenhof fluas laŭ la sama torento de pensa disvolviĝo en Rusio: Rusa literaturo, Narodnikismo, Universalismo, Kosmismo... La internaciismo de rusa penso (Lavrov, Solovjev, Fjodrov k. a.) estas kristaligita en Esperanta ideo de Zamenhof. Eroŝenko, devenanta de la simpla kampulo “*mufik*”, enspiradis hejme aeron, plenan je tiuj plej altaj rusaj ideoj.

Kvankam Eroŝenko ne ricevis edukadon en alta lernejo, tamen li ricevis plej altan edukadon dank’ al Esperanto. Pere de Esperanto li konatiĝis kun elstaraj inteligencioj en Rusio, Japanio kaj Ĉinio. Li fariĝis intelektulo, deveninta el simpla popolo, samkiel Ĉeĥov kaj Gorkij. Narodnikoj rigardis Gorkij-n intelektulo el popolo. Kiel Gorkij, tiel Eroŝenko posedas simplecon de rusa popolo kaj profundecon de rusa inteligentia ideo.

Translima agado

Eroŝenko iris al Britio en 1912 por ricevi edukadon en la lernejo de blinduloj. Sed kiel multaj narodnikoj, tiel ankaŭ li desapontiĝis je atmosfero en disvolviĝinta Eŭropo. Li ne povis trovi tie iun taŭgan sferon de sia agado. Eble, li povis ellerni la anglan tie. Plej bona rikolto estas renkontiĝo kun Kropotkin, la granda rusa pensulo de narodnikismo kaj anarkiismo. Kiel unu el narodnikoj, enirintaj en popolon (*narod*), Kropotkin akceptis varme Eroŝenkon, rusan simplan junulon el popolo. Rusaj narodnikoj el alt-nobela klaso, kiel Bakunin, Lavrov, Kropotkin, inklinas idealigi rusan popolon (*narod*). Mi konjektas, ke Kropotkin vidis en blinda Eroŝenko “idealan rusan narod-on” kun mistika forto de rusa komuna tereno (*obschina*), ĉar Kropotkin mem mistikigis en sia “teorio de Interhelpo” rusan vilaĝan komunumon. Por juna Eroŝenko tiu renkontiĝo estas neforgesebla kaj li rakontadis al japanaj inteligencioj pri tio.

Irado en Japanion

Reveninte al Rusio, tuj poste li turnis sin al Japanio. En 1914 li atingis la domon de unu japana Esperantisto, fama sciencisto Nakamura Kijoo, deveninta de Chōshuu, centra forto de Meizi-Revolucio. Tra Nakamura eblus facile malfermiĝi la pordo al tiama japana regantaro (kliko de Chōshuu). Sed Eroŝenko ne interrilatis kun la regantaro, sed kun kontraŭreĝimuloj, kiel Oosugi Sakae, Akita Uzyaku. En tiama Japanio la tempo estis t. n. “la epoko de *Taishō*-demokratio”, kiam ekfloris diversaj progresaj ideoj, artoj kaj literaturoj.

Mondo de japanaj Esperantistoj estis tiam la plej alta akademio, konsistanta el alt-nivelaj sciencistoj, verkistoj, kaj artistoj. Oni bonvenigis Eroŝenkon, kiel junan Esperantiston kaj reprezentanton de rusa “*narod*”, idealigita de Tolstoj, Dostojevskij kaj Kropotkin. Eroŝenko siavice posedis sufiĉan talenton respondi al la espero de japanaj intelektuloj, ravitaj de rusa literaturo. Ili vidis en Eroŝenko heroon de rusa literaturo, kiel Platon Karataev. Blinda Eroŝenko vestis sin per rusa bluzo, nomata “*rubaska*”, kaj ludis bone rusan tradician muzikilon “balalajko”, ĉar muziko estas plej grava subjekto en moskva blindula lernejo, kiel unu el necesaj iloj por vivi. Baldaŭ Eroŝenko fariĝis fama stelo ne nur en japana alta societo, sed ankaŭ en japana publiko. Ekzemple, li kune kun japana fama pentristo, Takesita Jumezi, vizitadis provincojn por propagandi progresan idealon inter japana popolo. Tia estas ilia narodnikeca movado “eniri en popolon”. Koncerto de Eroŝenko estis nemankebla programero por ĉiuj kunvenoj.

Li lernis la japanan lingvon kaj posedis ĝin ĝis tiom, kiom eblas verki fabelojn japane. Liaj fabeloj estas plenaj je revolucia romantismo, simila al verkoj de Gorkij, Garŝin kaj narodnikaj verkistoj. Por rusoj rusa literaturo estas lulkanto, do ili de infaneco absorbiĝis je Puŝkin, Lermontov, Gogol, Turĝenev, Dostojevskij, Tolstoj, Ĉeĥov, Andrejev k. a. Eroŝenko parkeris multajn poemojn kaj dramojn. En Ĉinio li instruis historion de rusa literaturo. Japanoj miregis, ke li, kvankam blinda, eĉ povis ĝui teatron. Samkiel Gorkij kaj Garŝin, ankaŭ li havis sufiĉan kapablon verki sian

originalan literaturon. Ŝajnas al mi, ke Eroŝenko, kvankam ne atingis tian altan nivelon de supre menciitaj granduloj en rusa klasika literaturo, tamen almenaŭ en ĝenro de fabeloj li sendube estis unu el elstaraj fabel-verkistoj. En verkoj de Eroŝenko kondensiĝas fantazio de “*narod*” kaj rusa revolucia romantismo kun idealo de nelaciĝintaj semantoj ĉe Zamenhof de la epoko “*malenkoe delo* (malgranda afero)”. En ĝi folietoj, arboj, floroj, birdoj, ŝtonoj, riveroj, montoj, ŝteloj, luno kaj suno, ĉiu “ero”, kiel necesa parteto, konsistigas universon, samkiel en la poezio de Lermontov.

Inter japanaj socialistoj kaj anarkiistoj

Kamichika Ichiko, fama aktiva feministo, estis proksima amikino de Eroŝenko. Kiam ŝi tranĉis pro sia ĵaluzo sian amatan viron, anarkiiston Oosugi Sakae, tiam Eroŝenko ege kompatis al ŝi. Laŭ sociala ideo, ili estis proksimaj. Oosugi fondis lernejon de Esperanto, kie multaj ĉinaj studentoj ĉeestis (Liu Shiwei, Zhang Ji k. a.). Li tradukis verkojn de Kropotkin en la japanan. Eroŝenko rakontis al ili pri sia renkontiĝo kun Kropotkin. Eroŝenko mem aktive partoprenadis tiaman socialisman movadon kaj lekciis. Rezulte de tio li estis arestita kaj elpelita el Japanio. Inter japanaj Esperantistoj troviĝas multaj maldekstruloj, inkluzive de Takatsu Seido, do Eroŝenko devis esti enkondukita en ilian movadon, ĉar en Rusio li mem kreskis en tia kontraŭreĝima revolucia atmosfero de narodnikismo kaj marksismo.

Ideo de Eroŝenko ŝajnas pli proksima al anarkiismo ol al bolŝevismo, ĉar li preferis esti libera ol obeema. Sed li fervore deziris reveni al Ŝovet-Unio post la oktobra revolucio. Kropotkin ankaŭ revenis al Rusio post la revolucio. Tio estas enigmo. Ĉu pro ilia amo al patrolando kaj rusa popolo aŭ ili esperis la futuron de rusa socialismo? Mirinde, ke Eroŝenko revenis de Parizo al Sovetio, eĉ post kiam li spertis kolektivizacian en Ĉukĉi. Estis certe, ke ili kredis eblecon de sia kontribuo al socialismo, sed tute vane. En ilia hejmlando, nek tiam nek nun, oni preskaŭ povus ĝuste taksi ilian socian ideon, ĉar ili estas profetoj.

Salono de Nakamura-ja

Kolektiĝis en la salono multaj japanaj artistoj kaj fremduloj kiel Subhaz Chandra Bose, juna batalanto por sendependa Hindio. Eroŝenko estas ŝatata membro de la salono. Lin pentris famaj pentristoj, Nakamura Tsune kaj Tsuruta Goro, kaj la portreto de ĉi-lastata ankoraŭ estas en restoracio Nakamura-ja. Tie Eroŝenko konatiĝis kun kulturuloj de tiama japana societo. Bose instruis kuiru tie hindian manĝaĵon “rizo kun kareo”, kaj Eroŝenko – rusan frititan panon “*piroĵki*”. Ambaŭ manĝaĵoj ankoraŭ nun estas specialaĵoj en menuo de restoracio Nakamura-ja. Eroŝenko estas pli maljuna ol Bose je 7 jaroj. Eble, iom da rusa penso de Eroŝenko povus esti transdonita al la hindia aktivulo. Gandhi ankaŭ ricevis grandan influon de Tolstoj. Rusan kulturon kaj literaturon oni jam sciis per legado de Tolstoj, Dostojevskij k. a. Kaj nun en realo staras vivanta rusa narod, blinda Eroŝenko, kiel enkarniĝo de rusa spirito. Portretoj de Eroŝenko similas al ikono, antaŭ kiu oni ne devas ne adori.

Dume Eroŝenko mem iĝas mistika per absorbiĝo en religio “Bahaaj” por purigi sian koron kaj por renovigi trankvilan konsciencon, samkiel narodnikoj-diohomoj (N. V. Chajkovskij k. a. *bogoĉloveki*). Kvankam li ne fariĝis bahaano, tamen li proksimiĝis al la religio. Portretoj reflektas tian spiritecon de Eroŝenko.

En Ĉinion

Elpelite el Japanio, Eroŝenko volus reveni al Rusio, sed ne eblis al li transiri la landlimon. Akceptis lin en Ĉinio Lusin kaj lia frato Zhou Zuoren, fama Esperantisto. Ili alte taksis talenton de Eroŝenko, kiel verkisto de fabeloj. Lusin eĉ tradukis kelke da verkoj en la ĉinan lingvon. Ili kaj rektoro Cai Yuanpei invitis Eroŝenkon al la Pekina Universitato por instrui rusan literaturon kaj Esperanton. Estus malfacile diri, ke la lekcioj sukcesis. Li ne povis ellerni la ĉinan por interkomunikiĝi, do li devis senti sin soleca en sia ĉina vivo. Sed gravas, ke taksis lin tre alte Lusin, fondinto de nuntempa ĉina literaturo. Eroŝenko uzis la japanan por interparoli kun Lusin, kaj la anglan kun neesperantistoj. Huxi laŭdas lian anglan, kiam li interpretis la lekcion de Eroŝenko. Pozitivisma ideo de Huxi estas simila al rusa sociologia narodnikismo. Huxi kaj Lusin ambaŭ alte taksis ĉinan antikvan pensulon, Mozi-on, kies pensmaniero (ekzemple pri neagresado) estis tre proksima al Tolstoj kaj Kropotkin.

En Sovet-Unio

En 1924 li revenis al Rusio, al nova Sovet-Unio. Li eklaboris kiel tradukisto-interpretisto de la japana lingvo por japanoj-komunistoj en la Komunisma altlernejo en Moskvo. Poste en 1929 li foriris al Ĉukotka en fora oriento. De 1935 li fariĝis estro de blindula lernejo en Turkmenistano. Post la dua mondmilito li revenis al Moskvo kaj poste hejmen al Obuhovka. Laŭ diro de miaj moskvaj amikoj, amaso da lia postlasita brajla dokumentaro estis forportita per kamiono ien, ne konatan, kaj perdiĝis.


Malmultaj verketoj, publikigitaj en “Esperanta Ligilo”, montras al ni, ke Eroŝenko konservis sian kritikan sintenon eĉ al Sovetia reĝimo. Li kritikis mortigon sub la nomo de “klasbatalo”, skribante:

“Unu el tiuj terurigaj maŝinoj por hommortigado, kiujn vi ĵus montris al ni, povas dum kelkaj minutoj neniigi la tutan nian popolon, la tutan loĝantaron de la Tundro. Ĉu ni povas admiri tion? Ĉu ni rajtas nomi tion saĝa? Sed vi ŝajnas fieri pri tio. Se tio estas saĝeco, ĝi estas fatala saĝeco, gvidanta vin al via pereco kaj eble al la nia ankaŭ.” [“La trimova ŝakproblemo”]

Tiu vorto profetas la sorton de la Sovetio. Tie li esprimis ankaŭ la ideon, similan al Narodnikismo, ke “ne instrui sed lerni de la ĉukĉoj la komunismon devas vi, eŭrope edukita homaĉo”.

Preterpasis Eroŝenko-n la Granda Purigo de Esperantistoj en 1937-38 jaroj. Li estas fakulo de Esperanto kaj la japana lingvo, rigardataj kiel plej danĝeraj lingvoj en Sovetio. Tiel do ne troviĝis iu kampo, kie ajn eblus al li aktive agadi, krom fora blindula lernejo kaj ŝako-ludo. En ambaŭ kampoj li faris bonon. Li daŭrigas agadi en

fora periferio por plibonigo de edukado por blinduloj. Li gajnis la trian rangon en la ŝako-turniro en 1938, dum multe da Esperantistoj estis mortigitaj. Sed, kompare kun lia brilega vivo en Japanio kaj Ĉinio, la vivo en Sovet-Unio tute perdis lumon. Neniu estas profeto en sia urbo.



Grupo de la partoprenantoj de la Unua Tutrusia turniro de blindaj ŝakistoj de Tutrusia Blindul-Asocio dum la ekskurso en parko Peterhofo, apud tiama urbo Leningrado. Sidas en centro - Vasilij Eroŝenko, dekstre de li - lia fratino Pelagia. La turniro pasis inter 10-28 julio 1938. Vasilij Eroŝenko venis por partopreni ĝin el urbo Kuŝka (Turkmenia SSR) kaj gajnis la trian lokon kaj premio 250 rubloj inter 15 partoprenantoj.

(de nekonata fotisto, 15 aŭ 21 julio 1938, en Petergofo, Rusio. La foto estas en familia privata arkivo de s-ino Helena ANDRONOVA, pranepino de Peliagia Eroŝenko (la fratino de Vasilij), kaj estas donitaj por memora verkaro laŭ speciala permeso de s-ino ANDRONOVA.

写真：1938年7月、レニングラードにて、全ロシア盲人協会のチェス大会の参加者。前列中央がワシリー・エロシェンコ、その右が妹のペラギア・エロシェンコ。この大会のためにトルクメン共和国から出てきたもの。

(要約/resumo) エロシェンコにとってエスペラントは「私の大学」であった

ナロード（人民）出身の盲目の少年エロシェンコがこの語学の習得によって人格形成をし、日本と中国に多大の影響を及ぼした。また日本のエスペランチスト集団はそれ自体が学問と文化の最高の殿堂であった。大正デモクラシーの知識人たちにエロシェンコは学び、そしてロシアの思想を教えた。ロシア文学を愛する日本人たちはエロシェンコにその理想的主人公「ナロード」の像を重ね合わせた。彼はゴーリキイと同じく、ナロード出身の学歴なき盲人インテリであった。彼の肖像画には神秘性がある。それには彼自身の高い人格性と同時に、彼を通してロシアと全人類に憧れる日本人画家たちの精神性が結合している。ソ連時代にかろうじて発表されたわずかの作品でも、彼の到達した高い思想的境地が輝いている。しかし、ソ連では盲学校での教育と盲人将棋大会3位になる以外に彼の才能は生かせなかった。

(佐々木照央)

La akrvida blindula poeto

Shi Chengtai (Ĉinio)

Vasilij Eroŝenko (1890-1952), la rusa blindula poeto alvenis en Ĉinion en oktobro de 1921, elpelite de la japana registaro, en Shanghai juna esp-isto Hujucz akceptis lin, poste li veturis al Pekino, kaj loĝis en la hejmo de s-ro Lusin, la granda ĉina verkisto. S-ro Lusin ĉinigis liajn fabelojn verkitajn en la japana lingvo. Tiam li donacis al la ĉinaj junuloj la “Ruĝa floro”-n, ankaŭ ekde tiam en iliajn korojn ĉizis “Cikatro de amo”-n.


Kvankam V. Eroŝenko estas nomita “la blindula poeto”, tamen liaj ĉefverkoj estas fabeloj. Legante liajn fabelojn, “lia sonĝo naiva, bela, sed kun vereco” tiras mian koron, eĉ mi ankaŭ sentas “la triston de la aŭtoro, kiu vokas en la mondo ĉiujn ami, sed ne gajnas la amon” (laŭ s-ro Lusin).



“Oni nomas lin revisto, aliaj diras ke li estas anarĥiisto, aliaj timas ke li estas ‘danĝerulo’; ili ĉiuj lin malkomprenas. Li estas homaranisto, nur homaranisto.” (*1) Kvankam li estas blindulo, tamen li pli klare konis nian mondon ol aliaj. Ŝajnas al mi, ke li konus nian mondon per sia animo ĉiujn ami, tial li havus pli akran vidon ol aliaj.

Eĉ hodiaŭ mi relegante lian fabelon *La trimova ŝakproblemo* – la tria skizo el la ĉukĉa vivo –, pri la homa tragedio de ĉukĉoj en la Tundro, mi ankoraŭ sentas min timtrema. V. Eroŝenko skribis en la Antaŭparolo: “la skizo estis skribita jam en junio de 1934, sed mi perdis la manuskripton dum mia vojaĝo al Turkmenio en la sama jaro. Nur dum ĉijara libertempo (1938) mi ekprovis reskribi ĝin, kaj jen la rezulto.” (*2) laŭ la notoj faritaj de la kompilinto de *La tundro ĝemas*, s-ro Mine Yositaka, nia estimata eroŝenkologo, la skizo aperis nur en “aldono al Esperanta Ligilo” en decembro, 1947.

La aŭtoro en Julio de 1929 alvenis en la ĉukĉan kulturbazon por viziti sian fraton, la bazan veterinaron, tie li pasigis kelkajn monatojn kun aventurplena vivo. La aŭtoro skribis: “Ju pli grandiĝas niaj mondaj urbegoj, la centroj de la civilizacio, des pli malgrandiĝas la homo, des pli banaliĝas, kaj trivialiĝas, bagateliĝas kaj mizeriĝas... Kaj gravas tiam ne homo mem sed lia kapitalo, ne lia kapo



sed lia poŝo, ne lia koro sed lia oro.” Tamen la ĉukĉoj vivas en la Tundro de la arkta regiono de la Nord-orienta Azio tute estas alie. “Tie oni lernas ŝati la homon mem, ĝuste taksi lian vivon, respekti lian liberecon.” (*3)

En la skizo (fabelo) troviĝas la atentokapta intrigo, kiu igis nin serioze mediti. Iu eŭrope edukita kuracisto de la bazo, komunisto, “celis politikan karieron”, instruis al ĉukĉoj, kio estas la klasbatalo kaj komunismo, tamen iu parolis “ne instrui sed lerni de la ĉukĉoj la komunismon devas vi.” dum li prelegas.

Iutage la propaganda fako de la bazo invitis la indiĝenajn gastojn spekti filmon por altigi ilian klasbatalan konscion. Vidante la sangajn batalajn scenojn de la unua mondmilito kaj la rusa enlanda batalado, ĉukĉa naiva kaj bonkora junulo, amiko de la aŭtoro (mi-o en la skizo) dolore tremis, eĉ feblis. La kuracisto batis la junulon per la violona arĉo, insultante, la aŭtoro kolere forĵetis la arĉon protektante sian amikon...

La ideologia konflikto fariĝis sanga agado, la kuracisto denunciis al GPU (Ŝtata Politika Administracio). Tiu vorto “eŭrope edukita” signifas edukitan en la eŭropa parto de Soveta Unio, mi komprenas. Eĉ “la estro de la GPU invitis min amike ludi ŝakojn kun li post la matenmanĝo”. La aŭtoro estis jam atentita de GPU pro lia kompatato al ĉukĉoj kaj aprobadato al iliaj opinioj.

La aŭtoro meditis antaŭ ŝaktabulo por solvi la trimovan ŝakproblemon, li komprenis, ke tiu ankaŭ estas la viva problemo: naskiĝo, vivo kaj morto. Laŭ la “nigra nomlisto” de la tundraj amikoj, kiun subŝovis la eŭrope edukita friponego, “en GPU-ejo nepriskribebla tumulto; denove oni planas amasajn arestojn.” (*4) Je la fino de la skizo, la aŭtoro skribis: “tra la dolĉega duonsongō, mi aŭdis ankoraŭ la kuiristinon senbrue engliti mian ĉambron. Ŝin sekvis ankaŭ senbrue la bazestro kaj la GPU-estro. Mia ĉiam bonkora protektantino nun flustris: ‘Mi ĉiam suspektis, sed nun mi estas certa.’ Pri kio ŝi estis certa, mi jam ne aŭdis, ĉar mi endormiĝis... Mi malestiĝis... Mi mortis.” (*5)

Antaŭ legantoj ja estas la interhoma tragedio! La aŭtoro skribis, ke la skizo estis verkita en 1934, sed la manuskripto perdiĝis dum vojaĝo al Turkmenio, reverkis en 1938, tio eble estus preteksto, tamen 1934 ja estis antaŭnokto de la Granda Purigo. lanĉita de J. Stalin, kiu okazis en 1937-1938, en tiu katastrofo preskaŭ ĉiuj aktivaj sovetuniaj esperantistoj estis purigitaj – mortigitaj aŭ ekzilitaj en la koncentrejojn. Nia blindula poeto tiam restis en Turkmenio, lia verko estis en la blindula skribo de Esp-o, feliĉe li travivis dum la Granda Purigo. Ĉi tiu skizo de V. Eroŝenko ĝuste estas la unika aŭtenta raportaja verko en tiu periodo, la aŭtenta noto de “lia songō naiva, bela, sed kun vereco”. Li ja estas elstara profeto, per sia animo antaŭsentis pri alveno de tiu homa katastrofo, la publikigo de tiu verko ja estas la miraklo inter mirakloj! Li eĉ pli klare vidus la mondon ol ni, malblindaj.

V. Eroŝenko jam forlasis nian mondon, tamen liaj fabeloj ankoraŭ kortuŝas nin, per la 12a volumo de *Plena Verkaro de Lusin* rezervanta iujn el liaj verkoj, tradukitajn de Lusin, la ĉinaj legantoj ankoraŭ povas aŭdi lian vokon de “la tristo de

la aŭtoro, kiu vokas en la mondo ĉiujn ami, sed ne gajnas la amon”, pli feliĉe samideanoj povas legi en Esperanto liajn ĉefverkojn. Dum alveno de lia naskiĝtaga 125a jubileo, la plej bona memoro por nia blindula poeto ja estas refoje legi liajn verkojn, kaj klopodadi por la homara harmonio – Homon ami mem.

2015-04-23, Daqing

Notoj

- (*1) “Lumo kaj ombro”, kompilita de Mine Yositaka, Japano Esp-a Librokooperativo, 1979, p. 3
- (*2) “La tundro ĝemas”, kompilita de Mine Yositaka, Japano Esp-a Librokooperativo, p.32
- (*3) same (*2), p.23
- (*4) same (*2), p.63
- (*5) same (*2), p.63

(要約/resumo) 慧眼な盲詩人

日本を 1921 年に追放されたエロシェンコは上海に行き、さらに北京に出て魯迅の家に住むことになった。詩人と称されるエロシェンコだが、作品には童話が多く、その作品は慧眼をもって世の中を見ている。

1930 年代のシベリアでの作品を読むと、都会の政治思想かぶれの人間よりもチュクチ人の素朴さを評価していることがよみとれる。

中国では魯迅全集の第 12 巻に魯迅訳のエロシェンコの作品が収録されていて、いまでも人々に感動を与えている。


(石成泰)

Rakontoj de Velkinta Folio

Aoyama Tooru

Kiam mi estis studento de la Ŝtata Universitato de Jokohamo, en la universitato troviĝis esperanto-klubo. Tiutempe en la universitato estis tri famaj esperantistoj-profesoroj: Watanabe Teruiti, Kosimura Sinzaburo kaj Nagasu Kazuzi. Prof. Watanabe estis konsilanto de la klubo.

Mi ne povis aĉeti plurajn esperantajn librojn pro malriĉeco, sed la klubo posedis kelkajn librojn. Inter ili troviĝis “Rakontoj de velkinta folio” verkita de Vasilij Eroŝenko. Tiutempe en Japanio estis haveblaj ne multaj libroj alilandaj. La libron eldonis Japana Esperanta Librokooperativo en Kansajo en 1953. Subtitolo de la rakontaro estis “malgrandaj fabelaj skizoj de Ŝanhaja vivo”.



En la antaŭparolo Eroŝenko skribas: En Ŝanhajo mi estis soleca. Mi havis du amikojn, sed ankaŭ ili estis solecaj. Ni sentis, ke nia feliĉa ŝipo rompiĝis, kaj ni estis ĵetitaj sur la dezertan insulon, nomatan Ŝanhajo. (Eroŝenko verkis antaŭe la rakonton, titolitan “Feliĉa ŝipo”). Unu tagon mi haltis antaŭ unu granda arbo. Sur ĝi vidiĝis nur unu velkinta folio. La velkinta folio rakontis kelkajn rakontojn.

Kaj sekvis ses rakontoj kiel jene.

La unua rakonto estas “La strata arbo”: en la strato de tiu ĉi urbo mi konas unu grandan arbon. Nun ĝi staras silente, nun ĝi diras nenion. Ĝi vidis la popolon rabitan de siaj altrangaj rabistoj kaj ankaŭ de fremdaj malaltrangaj rabistoj. La arbo silente rigardas la junulojn kiuj prenas vivkoston opion. Sed la arbo diras nenion.

La dua rakonto estas “Pri lando de revoj”: la sudaj zefiroj invitis la verdajn foliojn serĉi la landon de l’ revoj, kaj la folioj demandas la bonan arbon, ĉu la spirito de niaj junaj animoj estas fidinda. Sed la arbo silentas, kaj nenion volis paroli. Kaj la verdaj folioj diras: “Ni iros nenien, nenien ni iru por serĉi la landon de l’ revoj”, kaj la suda zefiro forflugis.

La tria estas “La sekreto de unu malgranda knabino”: unu knabino venas al la arbo kaj parolas: “Mia pliaĝa frato tuŝas kun sango, la geonkloj permesas al li fari nenion, kaj mi ne povas apogi min sur liajn genuojn. Donu al mi kelke da viaj folioj por kunplekti el ili verdan kronon por li.” Sed la arbo silentis. Nur kelkaj folioj kliniĝis al la tero, kaj la knabino kun ĝojo faris kronon el ili. Ŝi haste revenis al la hejmo, sed la frato estis jam morta.

La kvara rakonto estas “La homo-ĉevalo”: venis ĵinrikŝisto al la arbo kaj diris: “Ĝis kiam mi devas esti por ili ĉevalo? Oni elbatis la dentojn el mi kaj mi ne povas

plu mordi.” Sed la arbo diris nenion. Matene policianoj trovis sub la arbo la homon mortintan kun dentoj miksitaj kun sango en la mano.

La kvina rakonto estas “Unua trezoro”: venis al la antikva arbo unu kripla knabino kaj parolis: “Unu bela viro donis al mi monon. Kaj mi ekamis lin, sed kiam refoje mi renkontis lin, li diris; “For monstro, diableto!” Ŝi kaŝis sian vizaĝon sur la ŝtona brusto de l’patrino-tero. Ŝi songis; en la songo ŝi estis heroino bela, kaj li, bela heroo. Neniam ŝi vekiĝis. La arbo silentis.

La sesa rakonto estas “La knabino kun malgrandaj piedoj”: venis al la arbo unu knabino kun tiel malgrandaj kaj delikataj piedoj. Ŝi rakontis al la arbo: “Mi havis fianĉon de la infaneco kaj ni amis nin, sed iutage li forlasis min. Kiam mi trovis lin, li diris, ke knabino kun malgrandaj piedoj ne taŭgas por marŝi la vojon de l’vivo. Kion mi faru?” Sed la arbo silentis. La sekvantan matenon fiŝkaptistoj sur la Granda Rivero kaptis en siajn retojn la korpojn de l’ bela knabino kun belaj malgrandaj piedoj.

Tia estas la enhavo de la rakontoj. Eroŝenko estis ekzilita de la japana registaro kiel danĝera persono, kaj li iris al Ŝanhajo. Li sentis tristan senton kontraŭ la kolonia urbo, Ŝanhajo, kaj ĉio pri la urbo malgajigis la koron de Eroŝenko. La urbo estis la plej granda urbo en Ĉinio, sed tie regis kolonietoj kaj granda konzerno, plie ĉiuj alilandanoj malestimis ĉinojn, kaj popoloj estis mizeraj.

Mi legis ĉi tiun libron en vintro en mia ĉambro nur kun hibaĉo kiel varmigilo. Estis malvarme. Kaj la libro temis pri malgajaj rakontoj. Do lia sento profundigis en mian koron.

Li donis influon al multaj famaj japanaj kulturistoj: Akita Uzyaku, Takehisa Yumezi, Masaki Hiroshi, Kamitika Itiko, Ibuse Masuzi, Sasaki Takamaru, Arisima Takeo, Ogawa Mimei ktp.

Tiu “Rakontoj de velkinta folio” aperis en 1953, kaj tiamaj multaj mezgradaj esperantistoj legis tiun facile akireblan kaj allogan libron. Kaj poste aperis ankaŭ de Japana Esperanta Librokooperativo en 1956 “Turo por fali”.

Poste ni povis akiri al ni la libron “Facilaj legaĵoj--- japane, やさしいエスペラントの読み物” eldonitan de Daigaku-syorin en 1962. En la libro troviĝis “Unu paĝeto en mia lerneja vivo” dulingve: en Esperanto kaj en la japana.

En 1970 ankaŭ de Daigaku-syorin aperis “Rakontoj de Eroŝenko” (du-lingva”).

S-ro Mine Yositaka redaktis verkaron de Eroŝenko en Esperanto kaj sinsekve aperigis la serion: “Lumo kaj ombro” en 1979, “La tundro ĝemas” en 1980, “Malvasta kaĝo” en 1981, “Stranga kato” en 1983, “La kruĉo da saĝeco” en 1995 kaj “Cikatro de amo” en 1996.

Tiuj estis facile akireblaj libroj de Eroŝenko verkitaj en Esperanto. Intertempe s-ro Takasugi Itiro publikis verkarojn de Eroŝenko en la japana.

Tiel mi eniris en la mondon de Eroŝenko. La verko “Rakontoj de velkinta folio” estis enirejo al alloga literaturo kaj pordo al profunda Esperantujo. Kaj mi fariĝis esperantisto.

(要約/resumo) 落葉物語

私は学生時代にエロシェンコの『落葉物語 (Rakontoj de velkinta folio)』を読み、感動してエロシェンコの世界に入り込み、またエスペラント文学にも親しむことになった。

(青山徹)

“Nom’ de l’fajr’ – estas am’ al liber”: **por 125-jariĝo de la naskiĝo de Vasilij Eroŝenko**

Julia Patlan’ (Kijivo, Ukrainio),
 Estrino de la Internacia scienca-esplora teamo
 “Vasilij Eroŝenko kaj lia epoko”, tradukisto

